

vintro 2006 · numero 8

Femina

revuo en esperanto · ne nur por virinoj

**Modo kaj etiko:
por evoluo daŭrebla**

**Devigata al silento
sed ne senvoĉa**

**Zeno: plenigante
la nenion**

Familia epopeo

**En kaj
ekster Eŭropo**

Ne estingota meĉo en nia kandelo por Anna



Karaj geamikoj,

Okazis io, kio profunde vundas nian sekson kaj ofendas nian senton de ĵurnalistoj. Ja vi legis: nia rusa kolegino Anna Politkovskaja estis kovarde murdita en sia moskva domo, la 7^{ma} de oktobro 2006. Simpla, praa maniero por silentigi voĉon nesilentigeblan, voĉo kies sola celo estis diri la veron en socio kie de ĵarcentoj la vero estas vorto kun unusola signifo: tio kio venas el la povo. Ne gravas ĉu la povon reprezentas la Caro aŭ Stalin aŭ iu, laŭleĝe elektita, Prezidento: nur ili posedas la veron, dum longa aŭ mallonga periodo, laŭ sortodecido. Ilia vero estas senkompata, ju pli kruela des pli vera. Ju pli nekredbla, neakceptebla, ju pli arogante falsa, des pli vera. Sakrilegia estas la voĉo leviganta por alimaniere paroli. La herezulojn oni siatempe ŝtiparumis, nun "demokratio" tion malpermesas. Do oni agas oblikve, profitante la plej etan pretekston por ruiniĝi tiujn, kiuj farigis danĝeraj. Ĝa demokratia prezidento de ne plu Soveta Unio (kaj ne plu cara Rusio) tion bone lernis kaj aplikis ĉiam, kiam li povis. Sed kun ĵurnalistino Anna Politkovskaja li ne povis – ŝi ne estis ĉantaĝebla, ŝin ne timigis minacoj, atencoj, malantaŭ tiu rideto preskaŭ knabina kaŝiĝis animo forta kiel diamanto. Per siaj militraportoj el Ĉĉenio ŝi riskis la vivon, sed ŝi sentis tion misio, necesa por savi la honoron de Rusio. Ke nur virino tion kapablis, la homoj memoru, ankaŭ kiam, kiel probable, oni nigriĝos ŝian figuron per mensogoj. Ankaŭ tio estas normala, en la "vira" mondo.

Femina
revuo en esperanto ne nur por virinoj

jaro 2, numero 8

posedas FEM
eldonas kaj administras LF-koop

ĉefredaktoro
Perla Martinelli
grafika asisto (kovrilo)
rolfo

kunlaboris
Marie-France Conde Rey

Leen Deij
Elena Grisafi
Kitaro Ibilisi
Klara

Jean-Jacques Lavanchy
Berta Lenard
Bertil Nilsson
Barbara Pietrzak
rolfo

Redakcio: <fem@esperantio.net>
Administrado: <lf-koop@esperantio.net>
poŝtadreso: CP 28, 2301 Chx-Fds
ISSN 1661-3309

Afriko TIETo, 11 BP 48, Lomé, Togolando
Argentino Inés Beaumont, Beruti 2792 3^o 9, C 1425 BBF Buenos Aires
Belgio Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Brazilo Brazilia Esperanto-Ligo, CP 03625, Brasília DF, 70084-970
Britio David Kelso, 5 Craighill Rd, Carluke ML8 4QT
Bulgario Ivanka Kirĉeva Stoyanova, p.k. 701, 9000 Varna
Ĉeĥio Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Podbrady II
Danlando Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. tv, 2100 København Oe.
Estonio Eesli Esperanto Liit, Raevoja plats 14, 10146 Tallinn
Finlando Literatura Foiro, PL 87, 00531 Helsinki – pĉk 800017-70845965
Francio Marie-France Conde Rey, rue d'Alexandrie 3, 16000 Angoulême
Germanio Libro servo Espero, Rolf Beau, Eisserkirchweg 18, 27333 Schweringen
Hispanio Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, 08202 Sabadell
Hungario Anna Lászay, Zsil u. 1.III.7, 1093 Budapest
Italio Orbis Pictus, V. Branković, Via Parini 5, 34129 Trieste
IEF, via Villorosi 38, 20143 Milano
Japanio JEI, Wasedameli 12-3, Sinzjuku-ku, Tokyo-to 162 – pĉk 00130-1-11325
Jugoslavio A. Kovač, Djure Djakovica 82, II - 11000 Beograd
Litovio Irena Alijošute, LEA, Zamenhofo 5, 3000 Kaunas
Nederlando UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, **konfo** I-I
Novzelando David Dewar, 4 Hartlech Mews, Christchurch 8004
Pollando Tomasz Chmielk, ul. Jarzebinowa 3/30, 21-040 Swidnik
Rumanio J. Sigmund, C.P. 200, 400310 Cluj-Napoca-1
Ruslando H. Gorecka, ab. ja. 1248, 230039 Kaininograd
A. Gonĉarov, ul. Lenina d.46, Karatuzskij r-on, Krasnojarsk'ij kraj
RU-662862 selo Verhni Kujhebar
Svedio B. Nilsson, Biskop Brask grand 25, 176 76 Järfälla - pĉk 37 47 48-2
Svislando LF-koop, CP 928, 2301 La Chaux-de-Fonds – pĉk 12-11114-5

La abonaj validas por la kalendara jaro.

Internacia abontarifoj (IT) 22.- EUR. Suplemento por aervoja sendo: 6.- EUR.
Por landoj ne menciitaj sin turni rekte al LF-koop.

REPRODUKTI TEKSTON AŬ BILDON EBLAS NUR POST LA PERMESO DE LA REDAKCIO

Pac-Nobelaj: ofte la plej noblaj

de Perla Martinelli

Kiam la amaskomunikistoj estis informitaj pri la asigno de la ĉi-jara Nobelpremio pri Paco al Muhammad Yunus, ekonomikisto el Bangladeŝo, la unua reago estis: mislokita persono en tiu kunteksto.

Sed tute ne. Por tion klare ekspliki sufiĉas unu frazo el la motivado de la norvega komitato: *Oni ne povas atingi daŭran pacon se grandparto de la homaro ne trovas la manieron eliri el la mizero.* Kaj disponigi iun manieron estas ĝuste kion faras la sesdeksejara bengalano, per sia *Grameen Bank*: ekde 1976 li donas al amaso da homoj – unuavice virinoj – la ilon por eliri el endemia malriĉo.

Li rakontas, en radia feliĉo (*Per sia decido la Nobel-komitato metis sian sigelon al la revo pri mondo liberigita el malriĉo!*) sian “simplan” historion. Juna doktoriginto el usona universitato, li revenis al sia lando por instrui ekonomikon. *Mi instruis al miaj studentoj elegantajn teoriojn, kaj ĉirkaŭ ni homoj mortis pro malsato... Do, necesis ion fari.* Kaj la “io” havas la nomon “mikrokredito”. Sufiĉas kelkaj dolaroj por startigi vivotenan entrepreneton, ekzemple aĉeti kudromaŝinon por tajlori aŭ kelkajn kokinojn por ovoproduktado, sed la malriĉuloj eĉ tion ne havas, kaj neniu pruntedonas al nenihavaj. Yunus riskis, donante sian konfidon unuavice al virinoj, ankoraŭ nun lia ĉefa klientaro. Lia

konfido neniam estis perdfidita: la etaj pruntedonoj estis redonitaj je 99%, aro da familioj nun vivas en decaj kondiĉoj kaj la sistemo pli kaj pli vastiĝis kaj fortiĝis. La mikrokredito ne estas ĉiosolva, sed certe efikega rimedo, kaj – kiel ni jam vidis en la Nobel-danka prelego de Wangari Maathai – la virinoj estas tuj pretaj kompreni kaj eluzi la eblecojn, ne ŝparante siajn fortojn por honeste sendependiĝi: kompare kun siaj viroj, ili estas pli fidindaj. Sed Yunus vidas pli foren: per sia privilegiado li konkrete proklamas, en muzumana lando, ke la virino estas egalrajta parto de la socio kaj tiel devas esti respektata. Lia banko ne petas permesojn aŭ garantiigojn de patroj, edzoj, fratoj: sufiĉas la memstara honorvorto de virino. Pravegis la norvega komitato: socia justo, ne nur financa, estas la unua kondiĉo por establi daŭran pacon.

Do, *Femina* aplaŭdas la ĉi-jaran laŭreaton, kvankam li ne povas eniri nian serion de honoritinoj per la Pac-Nobelo: serio startinta jam pasintjare kaj ĉiunumere aperanta, laŭ inversa kronologio, ĝis ni atingos baroninon Bertha von Suttner. Ŝi ne nur inspiris al Alfred Nobel la ideon pri la fama premio, sed eĉ estis la unua virino plenrajte ĝin gajninta. La serio ne estas tre ampleksa – nur dek unu virinoj en cento da jaroj...

Kiel vi certe rimarkis, foje ni preferis elekti la “pacnobelinon de la numero” kongrue al ĝia ĉeftemo, eĉ se tio iom perturbis la perfektan tempan sinsekon. Kiun ni resumas por via scivolo: Bertha von Suttner, Jane Addams, Emily Greene Balch, Betty Williams kun Mairead Corrigan, Patrino Tereza, Alva Myrdal, Aung San Suu Kyi, Rigoberta Menchú Tum, Jody Williams, Shirin Ebadi, Wangari Maathai. De 1905 al 2004, virinoj kiuj honoras la virinaron kaj la tutan homaron.



Muhammad Yunus,
Nobel-premiito
pri Paco 2006

Devigata al silento, sed ne senvoĉa

de Aung San Suu Kyi,
prononcita de ŝia filo Alexander Aris
tradukis Bertil Nilsson

Oslo, la 10^{ma} de decembro 1991



Daw Aung San Suu Kyi
ဒေါ်အောင်ဆန်းစုကြည်

Daw Aung San Suu Kyi naskiĝis en Rangoon, kiel tria filino de Daw Khin Kyi kaj de la nacia heroo Aung San, la 19^{ma} de januaro 1945. Li, tridekdujara, estis murdita en julio 1947, mallonge antaŭ la sendependiĝo de Birmo, nun Myanmar.

En 1958 ŝi sekvas en Hindion sian patrinon, nomitan ambasadoro de Birmo. En la sesdekaj jaroj ŝi studas filozofion, politikon kaj ekonomikon en oksforda universitato; post diplomigo en 1967 ŝi ekoficas en la sekretariato de UN en Novjorko.

En 1972 ŝi edziniĝas al la tibetologo Michael Aris, renkontita en Oksfordo. Komence ili vivas en Buthano, kie ambaŭ havas altan rangon; en 1973 naskiĝas ilia filo Alexander, en 1977 Kim. Ŝi revenas al la universitata vivo, instruante kaj esplorante pri la birma historio, ankaŭ en la celo verki libron pri sia patro. Post unu jaro en japana universitato (1985) kaj plia studengaĝo en Hindio kaj Londono, en 1988 Daw Aung devas reveni al Rangoon ĉar ŝia patrino estis trafita de ikto. Tie, en aŭgusto, ŝi unufoje politike engaĝiĝas kaj okaze de ĝenerala striko ŝi prezentas al entuziasma homamaso siajn principojn. Sed la 18an de septembro, post masakro de studentoj, generalo Saw Maung kaptakiras la regpovon, je kio la 24^{ma} Aung San kun du apogantoj organizas NLD-on (Nacia Ligo por Demokratio), kies ĝenerala sekretario ŝi fariĝas. Post la morto de sia patrino en decembro, Aung San Suu disvastigas tra la lando la ideojn de NLD, kaj kune kun aliaj partioj kaj kun studentoj organizas amaskunvenojn, spite al la milita leĝo. La 20^{ma} de julio 1989 oni ŝin arestas. En majo 1990, ĉe la voĉdonoj por nova Nacia Asembleo, NLD ricevas 80% de la voĉoj, sed la militistoj rifuzas cedi la povon.

En 1991 Daw Aung San, daŭre en strikta enhejma arestiĝo, ricevas la Pac-Nobelon. Post alternaj eventoj, ankoraŭ nun ŝi restas mallibera.

Mi hodiaŭ staras antaŭ vi komisie de Mia patrino, Aung San Suu Kyi, por ricevi ĉi tiun plej grandan premion, la Nobelpremion pri Paco. Ĉar la cirkonstancoj ne ebligas al mia patrino persone ĉeesti, mi faros mian plej bonon por interpreti la sentojn, kiujn ŝi laŭ mia kredo volus esprimi.

Mi scias, ke ŝi volus komenci dirante ke ŝi akceptas la Nobelpremion ne en ŝia propra nomo, sed en la nomo de la tuta popolo de Birmo. Ŝi dirus, ke ĉi tiu premio ne apartenas al ŝi, sed al ĉiuj tiuj viroj, virinoj kaj infanoj kiuj, dum mi parolas, kontinuas oferi sian bonfarton, liberecon kaj siajn vivojn en la strebado al demokratia Birmo. Ilia estas la premio kaj ilia estos la fina venko en la longa lukto por paco, libereco kaj demokratio.

Tamen, kiel ŝia filo mi volas aldoni ke mi persone kredas ke ŝi per sia sindediĝo kaj persona oferado fariĝis digna simbolo per kiu la situacio de la tuta popolo de Birmo povas esti rekonita. Neniu devas subtaksi tiun situacion. La situacio de tiuj en la kamparo kaj en la urboj vivantaj per malarion en la ĝangaloj en kiujn ili fuĝis; la situacio de la Budhanaj monaĥoj batajtaj kaj malhonoratataj. Nek ni forgesu la multajn aĝajn kaj tre respektatajn gvidantojn apud mia patrino, nun ĉiuj en karceroj.

En ilia nomo mi dankas vin, elkore, pro ĉi tiu granda honoro. La Birma popolo hodiaŭ povas levi la kapon iom pli alte sciante ke en ĉi tiu tre fora lando ilia sufero estis aŭdita kaj atentita.

Ni ankaŭ devas memori ke la soleca lukto okazanta en la forte gardata enfermejo de Rangoon estas parto de

multe pli granda lukto, tutmonda, por la emancipo de la homa spirito el politika tiraneco kaj psika subpremo. La premio, mi certas pri tio, ankaŭ celas honori ĉiujn engaĝitojn en tiu lukto, kie ajn ili estas.

Tute ne senmotive la hodiaŭaj eventoj en Oslo okazas en la Tago de Internaciaj Homaj Rajtoj, celebrata en la tuta mondo.


S-ro Prezidanto, la tuta internacia komunumo aplaudis la elekton de via komitato. Antaŭ nur kelkaj tagoj la Unuigintaj Nacioj aprobis unuaniman kaj historian rezolucion bonvenigantan eldiron de ĝenerala Sekretario Javier Pérez de Cuéllar pri la signifo de ĉi tiu premio kaj apogon al liaj ripetaj apelacioj por baldaŭa liberigo de mia patrino el ŝia arestejo. Universala koncerno pri la grava situacio de homaj rajtoj en Birmo estis klare esprimita. Sola kaj izolita inter ĉiuj nacioj de la mondo nur unua disidenta voĉo aŭdigis, tiu de la militista regantaro en Ranguno, tro malfrua kaj tro malforta.

Ĉi tiu reĝimo dum preskaŭ tridek jaroj da misregado reduktis la iam prosperan "Oran Landon", Birmon, al unu el la plej malriĉaj nacioj de la mondo. En la profundo de sia koro eĉ tiuj kiuj nun havas potencon en Ranguno devas scii, ke ilia fina sorto estos la sama kiu trafas ĉiujn totalismajn reĝimojn klopodantajn aldeveni sian aŭtoritaton per timigo, subpremo kaj malamo. Kiam la nuna birma lukto por demokratio eksplodis en la stratoj en 1988, ĝi estis la unua ondo el internacia tajdo de tiaj movadoj tra Orienta Eŭropo, Azio kaj Afriko. Hodiaŭ, en 1991, Birmo rimarkigas en sia daŭra sufero sub la manoj de subprema kaj senindulga militista regantaro, la Ŝtatleĝa kaj Ordorestarita Konsilantaro. Tamen, la ekzemplo de tiuj nacioj kiuj sukcese atingis demokration sendas gravan mesaĝon al la birma popolo; ke, finfine, pro la fakta ekonomia malfunkcio de totalismo la nuna reĝimo estos forpuŝita. Kaj hodiaŭ, antaŭ inflacio, mismanagerita ekonomio kaj preskaŭ senvalora kkyat, la birma registaro sendube riktolas kion ĝi semis.

Tamen, estas mia plej profunda espero ke ne pro completa ekonomia kolapso la reĝimo falos, sed ke la militista regantaro respondos al tiaj alvokoj al baza humaneco kiel tiu, kiun la Nobel-komitato

esprimis per sia ĉijara premio. Mi scias ke en inter la regantoj estas personoj al kiuj la nuna politiko de timigado kaj subpremo estas abomena, ĉar ĝi perfortas la plej sanktajn principojn de la budhisma heredaĵo de Birmo. Tio ne estas vana dezirplena pensado, sed konvinko, kiun mia patrino atingis dum ŝiaj traktadoj kun personoj en pozicio de aŭtoritato, montrita en la balotvenkoj de ŝia partio en balotregionoj konsistaj en preskaŭ nur arma personaro kaj ties familioj. Estas plej profunda deziro ke tiuj elementoj de modero kaj repacigo inter la nunaj regantoj malksaŭ siajn sentojn en la horo de plej profunda bezono de Birmo.

Mi scias ke se mia patrino hodiaŭ estus libera ŝi, dankante vin, ankaŭ petus vin preĝi ke la subpremantoj kaj la subprematoj forĵetu siajn armilojn kaj komune konstruu nacian bazitan sur humaneco en la spirito de paco.



Ŝanĝo okazas, ĉar nur pafilojn la militistoj posedas

Kvankam mian patrino oni ofte priskribas kiel politikan disidenton, kiu per pacaj rimedoj strebas al demokratia ŝanĝo, ni memoru ke ŝia serĉado baze estas spirita. Kiel ŝi diris: *La esenca revolucio estas tiu de la spirito*, kaj ŝi verkis pri la *esencaj spiritaj celoj* de la lukto.

La realigo de tio dependas ekskluzive de homa respondeco. Ĉe la radiko de tiu respondeco kuŝas, kaj mi citas, *la koncepto de perfekteco, la urĝo ĝin atingi, la saĝo trovi vojon al ĝi, kaj la volo sekvi tiun vojon se ne ĝis la fino, almenaŭ ĝis tia distanco kiu necesas por leviĝi super individuua sinlimigo...*

Por vivi plenan vivon, ŝi diras, oni devas havi la kuraĝon porti la respondecon pri alies bezonoj ... oni devas deziri porti tiun respondecon. Kaj ŝi firme ligas tion al sia kredo kiam ŝi skribas ...*Budhismo, la fundamento de la tradicia Birma kulturo, plej alte taksas la valoron de la homo, kiu sola inter ĉiuj estaĵoj kapablas atingi la superan staton de Budheco. Ĉiu homo havas en si la potencialon realigi la veron per siaj propraj volo kaj peno kaj helpi al aliaj realigi tion.* Fine ŝi diras: *La serĉo por demokratio*

en Birmo estas la lukto de la popolo por vivi plenan, senochavan vivon, kiel liberaj kaj egalaj membroj de la monda socio.

Ĉi tio estas la dua fojo, ke mia pli juna frato kaj mi en Norvegio ricevas grandan premion por mia patrino. En la pasinta jaro ni vojaĝis al Bergen por ricevi por ŝi Premion Thorolf Rafto por Homaj Rajtoj. Tio estis mirinda prelude por la evento de ĉi tiu jaro. Nun ni jam havas apartan senton por la popolo de Norvegio. Estas mia espero ke baldaŭ mia patrino povos partopreni tiun senton kaj paroli mem, anstataŭ pere de mi. Dume, tiu ĉi grandega subteno por ŝi kaj la birma gento servis por kunligi du popolojn de kontraŭaj partoj de la mondo. Mi kredas ke multo sekvos el la ĉenoj kiujn ni nun forĝis. Nur restas al mi vin ĉiujn danki el la fundo de mia koro. Ni esperu kaj preĝu ke ekde hodiaŭ la virino komencos kuraciĝi kaj ke en la venontaj jaroj la Nobelpremio de 1991 estos konsiderata historia paŝo al la atingo de vera paco en Birmo. La lecionoj de la pasinteco ne estos forgesitaj, sed ĝuste, la esperon de la estonteco ni celebras hodiaŭ. ☪



Kion signifas "spirite maskla"

de Jean-Jacques Lavanchy

En sia tre interesa artikolo (*Femina* 7) Armando Zecchin sin apogas sur la 114a maksimumo ("logion") de la Evangelio laŭ Tomaso, sed laŭ la traduko de Jean Doresse, kiu tekstas en la franca: *...Jésus dit: "Voici: moi je l'attirerai pour que je la rende mâle..."* (Jesuo diris: "Jen: mi ŝin **allogos** por ke mi igu ŝin maskla").

Mi preferas la tradukon de A. Guillaumont, H-Ch. Puech k.a., kiu tekstas en la franca: *...Jésus dit: "Voici que je la guiderai afin de la faire mâle"* (Jesuo diris: "Jen ke mi ŝin **gvidos** por igi ŝin maskla").

Tiurilate la serĉisto-teologo Charles Rittmeyer menciis la deklaron de Jesuo (Mateo 24,19) kiu tekstas jene en la franca: *Malheur aux femmes qui seront enceintes et à celles qui allaiteront en ces jours-là* (Ve al la virinoj kiuj estos gravedaj kaj al tiuj, kiuj mamnutros dum tiuj tagoj!) t.e. dum tiuj momentoj,

kiam la Spirito de la Vero (aŭ Sankta Spirito) manifestiĝos en ili, ĉar la fakto mem de la gravedeco aŭ de la mamnutrado kaptas ilian tutan atenton kaj tiuj virinoj ne atentos pri la fulmrapida manifestiĝo de la Sankta Spirito (t.e. la Kreiva Nekonscio) en ili mem. La periodo de gravedeco kaj de mamnutrado malebligas la absolutan flankenlason de la Egoo; tio estas la karakterizaĵo de la virinoj.

Do, laŭ Jesuo, ĉiu virino daŭre kapabla je objektiveco, je absoluta flankenlaso de sia egoo, eĉ kiam ŝi estas graveda aŭ mamnutra, estas (spirite) maskla. Tion montras kaj la maksimumo 114 de la Evangelio laŭ Tomaso kaj la deklaro de Jesuo pri la gravedeco kaj la mamnutrado en la Evangelio laŭ Mateo 24,19.

Laŭ mi, tiuj deklaroj de Jesuo situas larĝe transe de la problemo "masklismo/feminismo".

La redakcio partoprenas la doloron de Meta pro la forpaso de la tre amata edzo William Auld

La nigra realo de la virinoj

de Marie-France Conde Rey

APERinta en Francio ĝuste antaŭ la Virin-Tago 2006, tiu kolekto de 57 kontribuoj el elstaraj gefakuloj, kiel Françoise Gaspard, franca elekto al la Komitato CEDAW de UN, aŭ Fadela Amara, prezidanto de la movado "Nek Putinoj, Nek Submetitaj", aŭ Françoise Héritier, iama profesoro ĉe *Collège de France*, estas ordigita de Christine Ockrent, fama televid-jurnalisto, laŭ kvin ĉapitroj: sekureco, integreco, libereco, digno, egaleco. Tio sume celas doni kompletan mondrigardon de la plej akraj problemoj koncernantaj virinojn.

La unua konstato estas, ke virinoj en multaj landoj suferas neelteneblajn kondiĉojn. La histori-devena premo de viroj, fizika kaj socia, daŭre funkciadas sub preteksto de tradicio aŭ de religio aŭ de ambau, kun intermiksoj kiuj prezentas kiel sanktajn devojn aferojn ŝulditajn nur al antikvaj sociaj avantaĝoj. Ekzemple, klitorektomio tute ne estas trudita de la Korano. Mezurante la mizeron, kiu estas la vera funda plago, oni komprenas, ke ĉiam la unuaj trafitoj estas virinoj.

Tamen la pozitiva flanko en ĉi komenco de nova jarcento troviĝas ĉe la rimarko, ke virinoj rolas kiel batalantoj por plibonigo de la ekonomia stato. Se paroli pri mikrokredito, oni vidas, ke virinoj uzas ĝin multe pli efike kaj pli respondece ol viroj. Krome virinoj pli forte komprenas, ke estas grave, ke iliaj filinoj vizitu la lernejon kaj lernu bazajn higienajn preskribojn.

Alia parto de la libro montras, ke en Azio "mankas" virinoj, laŭdire naŭdek milionoj, pro la simpla fakto, ke naski filinon estas ekonomia katastrofo por ties familio. Nur nun oni komencas kompreni la konsekvencojn de tiu kvanta malkvilibro inter la seksoj; teruraj ili estas

por ĉiuj virinoj, kiuj perdas pro tio pli da libereco kaj da digno. Sama atento endas pri la "honorkrimoj". La plej eta provo liberigi de arkaikaj kutimoj kondukas rekte al morto, sen ŝirno de justico kaj kun beno de malkleraj religiuloj.

Vanus akuzi nur kelkajn etnojn. Ĉie, eĉ en ekonomie bonstataj landoj, indas taksu la specifajn problemojn: intergeedza perforto, malegaleco de salajroj, bremsu por atingi altajn postenojn, ktp. En Francio la lukto kontraŭ poligamio kaj klitorektomio estis tro ofte silentigata, pro la penso, ke en respekto al fremdaj kulturoj oni povas toleri perfortajn praktikojn. Tiu opinio estas tre danĝera. Sed oni konstatas progreson. Tial la libro-kontribuantoj ne nur listigas altruditajn suferojn, sed ankaŭ rakontas pri klopodoj ĉu de la viktimoj, ĉu de la patrinoj, por eliri el tiuj dolorigaj praktikoj.

La plej malfacile progresanta afero en Francio restas tamen la percepto de la sociaj genroj. Studo pri la bildigo de virinoj en televidaj filmoj montras eksmodajn sed daŭre uzatajn ŝablonojn. La politikaj partioj, spite al la nova leĝo kiu postulas tiom da virinoj kiom da viroj en la balotaj listoj, preferas pagi monpunon ol varbi kandidatinojn. Same en la jurnalista medio, la duono de la homaro estas reprezentita nur ĉe 21% de la informoj.

Sombraj kaj zorgigaj estas la priskriboj kaj analizoj de la virinaj vivkondiĉoj ĉie en la mondo, tamen oni devas konscii pri tiuj problemoj kaj forŝiri la valulon de indiferenteco. Informado estas la unua ŝtupo en la klopodoj kontraŭ maljusteco kaj diskriminacio. La feministan movado enskribigas en tiu ĉi longdaŭra strebo.



Christine Ockrent
gvidis la esplorojn
kiuj kondukis al
La nigra libro de
la virinaj vivkondiĉoj
kun tekstoj de
40 kontribuantoj
kunordigitaj de
Sandrine Treiner
Postparolo de
Françoise Gaspard
XO Editions 2006

Nur la virino povas findecidi



Nia kunlaboranto, apud sia hejmo: Nederlando, decembro 2005

de Leendert C. Deij

Abortigoj okazis en ĉiuj tempoj. Ĝis antaŭ nelonge ĉe malriĉulinoj en mallumaj postĉambretoj, per sorĉa trinkaĵo, varma akvo, trikilo. Multaj virinoj mortis. Riĉulinoj ricevis helpon de kuracisto.

La nederlanda Kriminala Kodo spegulas la malnovan kaj la novan tempojn. Jes, ankaŭ en Nederlando abortigo ne estas permesata. Laŭ la Kriminala Kodo (art. 296) tiu, kiu abortigas virinon estos enprizonigita dum maksimume kvar jaroj kaj ses monatoj. Se la abortigo kaŭzas la morton de la virino la abortiginto estos kondamnita al enprizonigo dum maksimume ses jaroj. Abortigo sen permeso de la virino estos punata per dekjdujara enkarcerigo. Abortigo sen permeso kaj kaŭzanta ŝian morton per dekkvinjara enkarcerigo. Ĉiuj supraj kazoj estas puneblaj ankaŭ per alta monopuno.

Abortigo ne estas punebla, se farita de kuracisto en malsanulejo aŭ kliniko, ricevinta permeson de la Ministro pri Popola Sano kaj Media Higieno.

Konsiderante la evoluon de la opinioj pri abortigo la registaro iom modifis la Kriminalan Kodon kaj kelkajn leĝojn. La punoj restas. Longa listo de paragrafoj, pli longa ol povas enteni ĉiuj paĝoj de *Femina*, preskribas formalojn, la taskon kaj kompetentecon de la kuracisto, la devigan kunlaboron de specialistoj pri psikologiaj kaj sociaj problemoj, la

informadon al la virino pri aliaj solvoj de ŝia problemo ol abortigo kaj pri prevento de gravediĝo, la funkcion, organizon, ekipon, personaron de la kliniko kaj multajn aliajn detalojn. La leĝo postulas, ke abortigo okazu ne pli frue ol la sesa tago post kiam la virino konsultis kuraciston kaj preparolis kun li sian intencan. Pluraj parlamentanoj tamen diras, ke la virino jam profunde pripensis sian intencan antaŭ ol ŝi iras al kuracisto, kaj volas forstreki la koncernan paragrafon.

Pri abortigo kristanoj kaj judoj havas diversajn opiniojn, ĉu fundamentismajn, ĉu liberalajn. La katolika eklezio kaj multaj protestantaj komunumoj rigardas abortigon murdo de vivanta estulo. Ĉirilate la kredantoj obeas la ordonon: *Vi ne mortigu!* En aliaj rilatoj, kiel defendantoj de la sankta kredo aŭ kiel patriotoj dum milito, ili tamen mortigas sam-kaj malsamkredantojn. Pluraj kristanaj komunumoj aprobas mortpunon. La katolika eklezio kaj ĉiuj protestantaj komunumoj akceptas abortigon, se la operacio estas necesa por savi la vivon de la patrino. Kion diras Islamo?

Islamo iagrade permesas abortigon, certe se la vivo de la virino estas en danĝero. La pli multaj teologoj decidis, ke la enblovo de la animo (la spirito de Alaho) estas la limo inter permeso kaj malpermeso de abortigo. Al la momento de gravediĝo oni aldonas 120 tagojn. Poste la animo estas enblovita. En konataj hadisoj (transdonita diro de aŭ pri Mohamedo) legeblas: *La kreo de ĉiu el vi okazas en la ventro de la patrino; dum 40 tagoj sub formo de embrio, poste same longe kiel bulo, poste same longe peco de harno. Tuj poste anĝelo estas sendita al ĝi kaj enblovas al ĝi la spiron de la vivo (ruh).*

El tio oni povas konkludi, ke ekde la gravediĝo dum periodo de 120 tagoj abortigo estas permesata! En okazo de seksperforto abortigo ĉiam estas permesata. Tiuokaze la virino estas tute senkulpa kaj meritas helpen de aliaj. La Korano diras pri tio: *Tiu, kiu troviĝas en kriza situacio ne pekos farante tion, kio estas ne permesata.*

Espereble plej multaj homoj opinias, ke post seksperforto abortigo estu permesata.

Diskutojn elvokas la "selektiva abortigo". La moderna medicino povas ekzameni la feton en la utero kaj prognozi gravajn difektojn. La infano estos kripla, deformita, idiota, mallonge vivipova. En la supre diritaj kazoj la pli multaj virinoj preferas esti abortigitaj. Sed ne ĉiuj. Ankaŭ handikapulo povas esti feliĉa. Oni povas bone vivi sen brakoj. Aparta kazo estas la sindromo de Down: *denaska afekcio, en kiu la infano prezentas oblikvajn okulojn kun mongola faldado, platajn nazostojn, mallongajn fingrojn kaj diversajn gradojn de mensa nesufiĉo.* Pro la oblikvaj okuloj la publiko nomas la naskitojn "mongoloidoj". Mongoloidoj ofte estas tre karaj kaj amataj de siaj gepatroj.

Defendi la vivon de nenaskito donas al homoj varman kavalirecan justosenton. Religiuloj krome kredas, ke protekti naskiĝontojn plaĉas al Dio. Tio klarigas ilian foje blindan fanatikecon kaj ilian absolutan rifuzon nuanci. Abortigo estas malpermesita en pluraj landoj. En landoj, kies kodo ne malpermesas abortigon, la katolika eklezio kaj protestantaj kolektivoj agitas la popolamason, ke ĝi postulu leĝan malpermeson. En Belgio antaŭ nelonge okazis granda manifestacio de kontraŭabortigaj aktivuloj, kiuj postulis tion.


En pluraj landoj, ankaŭ en Nederlando, okazis protestaj manifestacioj antaŭ abortigaj klinikoj. Oni eĉ atakis klinikojn per ŝtonoj. Kristanaj grupoj furiozis kontraŭ la organizaĵo por Homaj Rajtoj, *Amnesty International*. Ĝi proponis pledi por abortigo de virinoj, kiuj fariĝis viktimoj de seksa perforto. Grandinflua ligo de kontraŭabortigaj aktivuloj kaj katolikaj klerikoj riproĉis la organizaĵon, ke ĝi malkonfesis siajn principojn. Ili minacis deteni donacojn kaj alvokis superŝuti la ĉefoficejon de Amnesty per protestleteroj. La organizaĵo, kiu en 1977 ricevis la Nobel-premion pri Paco, famiĝis per la sama protestado. John

Henry Westen, estrarano de la kanada *Campaign Life Coalition*, (Kampanjo por Koalicio de l' Vivo) diris, ke la propono estas tute kontraŭ la celo de Amnesty. *Ni rigardas ĝin atako kontraŭ la rajtoj de nenaskitoj.*

Decido pri la propono estos farita dum la internacia kunveno de Amnesty en Meksiko 2007, reagis la organizaĵo. En la reago Amnesty defendas la rajton diskuti pri abortigo kaj kontraŭkoncipaj rimedoj lige kun la batalo por Virinaj Rajtoj. La ĉefoficejo en Londono emfazis, ke Amnesty ne fiksis sian politikon sub ekstera premo. La regionaj sekcioj de Amnesty estis petataj studi la demandon, ĉu la organizaĵo forlasu sian neŭtralan starpunkton pri abortigo. Anstataŭe ĝi povus deklari abortigon Homa Rajto en specifaj kazoj, en kiuj virinoj fariĝas viktimoj de seksperforto aŭ kiam la vivo de graveda virino estas en danĝero. La diskutoj montras, ke la membroj de Amnesty profunde malakordas pri la afero.

Organizaĵo, en kiu regas plena konkordo, estas

Women on Waves (Virinoj sur Ondoj). Ĝi aranĝas abortigojn sur la maro. Ĉar la nederlanda abortiga kodo estas pli elasta ol en aliaj landoj, en 2004 "Virinoj sur Ondoj" ricevis permeson de la Ministro pri Popola Sano kaj Media Higieno. En 2002 la inspektinstanco pri Sano trovis la postzorgon ne sufiĉa. Sur la ŝipo troviĝas ĉio, kio faciligas la zorgon okaze de akutaj komplikoj. Esceptokaze utera kuretado estas dezirinda longan tempon post forlaso de la ŝipo. Laŭ la inspektoroj "Virinoj sur Ondoj" ne donas tiun zorgon. Sed ankaŭ la pli ol 6000 eksterlandaj virinoj, kiuj ĉiujare estas abortigitaj en Nederlando, havas etan problemon, ke post hejmenveno kuracisto devas purigi la uteron. Kuracistoj en devenlandoj, kiuj malpermesas abortigon, helpas senprobleme. Perfekta zorgo por la virinoj do estas garantiata. Kiuj estas tiuj virinoj? La klinikoj kaj la ŝipo ne notas religiojn. Sed estas virinoj de ĉiuj vivkonceptoj, ankaŭ katolikaj. La katolika eklezio estas bastiono de dumvivaj fraŭloj, en kiu virinoj ne rajtas kundedidi. Se ili volas uzi preventilojn aŭ lasi sin abortigi, ili povas nur malobei la solregantajn virojn. Ĉiu rajtas esti kontraŭ abortigo. En Nederlando neniu kuracisto estas devigata abortigi. Ankaŭ ili rajtas esti kontraŭ. Sed pri siaj vivo kaj korpo povas fincedi nur la virino!



Familia epopeo

tra amo kaj kulturo



Marie-France
Conde Rey, edukisto,
prezidanto de FEM

recenzo de Marie-France Conde Rey

Grandan utilon atingis la tradukisto Jozefo Horváth elhungarigante la ampleksan intervjuon kiun d-ro László Polgár donis al Endre Farkas (eld. 1989).

Por ĉiuj pedagogoj, instruistoj, gepatroj k.a. la verko de Polgár estas nepre koninda. Li edukis mem siajn tri filinojn, kiuj fariĝis mondkonataj ŝakĉampionoj.

La libro, ĉapitron post ĉapitro, respondas al la demandoj de la legantoj, kaj la rakonto de la cirkonstancoj klarigas kial tiu eksterordinara pedagogia eksperimento trovis sukcesan rezulton.

Unua demando estas: ĉu vere ĉiu infano kapablas iĝi elstarulo? Gravaj konsekvencoj aplikeblaj en la ĉiutaga vivo fontas el la jesa respondo. Jam pluraj nepetrologoj (i.a. Doman, Usono 1965) kaj pedagogoj malfermis tiun vojon. Pli nova

eksperimento farita de Vexiau (Francio 1996) pruvis, ke ĉe aŭtismuloj kaj psikaj malsanuloj ekzistas ankaŭ bunta interna vivo, kaj ke ilia malsano trafas la komunikkapablon, kun tragikaj sekvoj, sed ne la fundan inteligentcon.


Dua demando: je kioma aĝo oni komencu fakigi lernanton? László Polgár pledas por aĝo inter la 3^a kaj la 4^a jaro. Kompreneble tio eblas por infanoj jam bone preparitaj. Laŭ mi tio supozas projekton ekde la nasko, se ne antaŭe. Polgár konfesas, ke kun sia edzino li pretigis pedagogian planon por la naskotaj infanoj. De tiu respondo, oni vidas, ke la eduka laboro okazis preskaŭ entute en la familo mem. La ordinara lerneja organizado ne povus satigi la bezonojn de tiel antaŭedukitaj infanoj. Kaj nun imagu la enorman kvanton da tempo, streboj kaj financaj rimedoj por fine realigi tiun longdaŭran eksperimenton, aldonante la kontraŭstaron de la loka kaj nacia registaroj, la dubemon kaj la envion de la tuta socia medio, la malicon de kelkaj gazetistoj, ktp.



László Polgár modeste aludas ĉion ĉi, sed ni povas kompreni, ke li mem posedis la genion, havigi al siaj filinoj la taŭgajn kondiĉojn por disvolvi iliajn kapablojn. Ĉu mi rajtus resumi tion per la kruda diraĵo de mia regiono: *Hundinoj ne naskas katidojn?*

Sekvaj demandoj traktas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu edukado. Ĉu per tio oni ne senigas infanon de ĝia infanaĝo? Ĉu infano konsentas pri tiu grandioza trejnado? En la tiutemaj respondoj kuŝas la kerno de la Polgár-metodo: amo, respekto, intereso, atento. Disdisciplino, jes, sed sen trudo nek tado. Sen tiu kleriga kaj kreskiga etoso, ne eblas sukcesoj. Mi emas aldoni, ke normalaj infanoj kapablas reagi al projekto, kiu estus aplikata kun nejusta intenco (ekzemple se la gepatroj celas la propran gloron aŭ riĉigon.) La teknika parto de la respondo priskribas la kapablon de junaj infanoj por fulmrapide kapti informojn kaj konojn, dum banala instruisto opinias, ke la instruado devas esti malrapida kaj ripetema. Tamen en tiu pedagogia revolucio ni konservu du ecojn: progresigajn ŝtupojn kaj tujan rezulton de la konoj por firmigi la enmemorigon.

Evidentiĝas, ke ŝakludantoj pli ol mi aprezas la ĉapitron pri ŝako. Multajn fakajn aludojn mi certe tute ne kaptis. Sed gravas, ke pro partoprenado en oficialaj turniroj la familio Polgár frontis la feminisman demandon. Ekzistas ŝakkonkursoj rezervitaj al virinoj. Kontraŭ tiu d-ro Polgár protestas kaj asertas, post jaroj da spertado, ke *inter la intelektaj donitaĵoj de virinoj kaj de virinoj, biologie ne ekzistas esenca, decida diferenco*. La tri fratinoj alportas vivantan pruvon al tiu konvinko de feministoj. Aliflanke la ĉapitro dediĉita al la intervjuo de Klára Polgár, la edzino de László, montras kiom tradicie estis dispartigitaj la roloj en la familio. Ĝis tiu punkto, ke Klára proverbas *Fadeno iras kien kudrilo ĝin tiras*. Tio signifas, ke kaj la pedagogio kaj la elekto de ŝako estis ideoj de la edzo. Ŝi alprenis ilin per edziniĝo – sed ja ĝuste al li, ne al alia, ŝi edziniĝis, konante kaj kunpartigante liajn priredukajn ideojn. Kaj certas, ke amo kaj respekto regas en tiu paro, kaj ke la propraj kapabloj de Klára (i.a. lingvaj) estis same utilaj por la edukado de la filinoj kiel tiuj de la edzo.



D-ro Polgár afable akceptis respondi kelkajn demandojn kaj eĉ disponigis al niaj legantoj unu el siaj kreaĵoj, la "stelŝakon".

D-ro Polgár, vi estas patro de tri geniaj knabinoj kaj aŭtoro de pluraj libroj, kie interalie vi priskribas la metodon per kiu vi ilin edukis. Sed estas tro reduktive priskribi vin tiamaniere. Kiel vi mem vin priskribus, sinteze?

Min karakterizas pretendema, persista kaj konsekvenca laborado ofte trostreĉita, troŝentemo, sopiro al grandaj plenumoj, vanteco en la pozitiva senco de la vorto kaj familicentreco. Dum mia vivo estis ĉiam tre grave por mi fari esplorojn kaj eksperimentojn pri la evoluigo de kapabloj (mi defendis mian doktoran disertacion en ĉi tiu temo).

En la lastaj jaroj mi laboras pri kreivodisolvaj ludoj kaj havas tiukampe plurajn inventaĵojn.

Mi ĉiam klopodis starigi miajn agadojn en la servon de humanismaj ideoj. Mi opinias, ke mi multe kontribuis al la emancipiĝo de virinoj. Mi klopodis subteni ankaŭ la E-movadon kaj lingvon. Pli ol dek miaj libroj estas verkitaĵoj en esperanto aŭ ankaŭ en esperanto.

Inter tiuj libroj, kiuj ŝajnas al vi plej gravaj por trafi viajn celojn?

Momente tiuj libroj, kiuj iel tuŝas miajn kreivodisolvajn ludojn.

Kompreneble estas gravaj por mi ankaŭ miaj ceteraj verkoj: mia teatraĵo, la libroj en esperanto (ĉ. 10 titoloj), tiuj kiuj okupiĝas pri edukado de geniuloj, ktp.

Ankaŭ en via libro "Eduku geniulon" vi aludas al "kreivodisolvaj ludoj". Ĉu vi bonvolus pli vaste prezenti al niaj legantoj ĉi tiun ideon?

Por ekzempligi mi prenu la t.n. stelŝakon, kiu estas mia inventaĵo, kaj kiu mem estas atesto de kreokapablo, ĝi ja revolucie renovigas la ŝakludon, de jarmiloj senŝanĝan. Ĝi konsistas el 37 fakoj anstataŭ la tradiciaj 64.



Kaj nun por ĉiam senresponda demando: kio okazus, se la Polgár-idoj estus kaj viraj kaj inaj?

Pluraj aliaj temoj flatis mian intereson. Pri la uzo de Eo kiel lanĉilo por la studo de fremdaj lingvoj, László Polgár donas al la hungara legantaro la jam bone konatajn argumentojn, emfazante la kulturajn kaj humanisman flankojn. Sed li ne iras ĝis la rekono de aldonita identeco. Mi ŝatus havi informojn pri la sento de la Polgár-idoj tiurilate.

La rolo de la familio gravegis. Ĝi estis la loko de unua kaj senkondiĉa amo, de sekureco kaj de solidareco. Pro la neceso studi hejme, la interfamiliaj ligoj firmiĝis kaj konsistigis la soklon de la tuta strebo al komuna celo. Nun la fratinoj atingis la aĝon patrinigi kaj certe enportis tiun modelon en novajn familiojn.

Tre kortuŝis min la ĉapitro pri judeco. László Polgár tre precize analizas la influon de sia identeco al sia projekto. Li klarigas, kial klereco estas grava parto de la juda tradicio: klereco estas tio kion oni povas ĉiam kunporti kiam oni fuĝas. Li lucide rigardas al la daŭre aktuala kaj urĝa bezono lukti kontraŭ antisemitismo.


Konklude mi substrekus du ĉefajn ideojn kiuj trakuras la tutan verkon. Unue la celo de edukado estas feliĉo. Prave. Tamen malfermiĝas granda diskuto pri kio signifas feliĉo. Polgár donas jenan difinon: *laboro + bonŝanco + amo + libero*. Mi konsentas je tri kvaronoj. Tiu "bonŝanco" titlas min. Ĉu nur "bonŝanculoj" rajtas esti feliĉaj, do nur ekcepta parto de la homaro? Aŭ ĉu bonŝanco estas tiu kapablo vidi en ĉiu sperto de la vivo, eĉ en la plej dolora, iun pozitivan eĉon? Ĉu ne ekzistas ankaŭ bonŝanculoj kiuj tute ne kapablas senti sin feliĉaj?

De tiu konstato ni transiru al la difino de genio: *laboro + bonŝanco*. Ĉu en tiu ĉi kazo bonŝanco ne estas la nura volo de gepatroj oferece dediĉi dudek jarojn el sia vivo al la ido, kun la pura intenco celi ĝian plej favoran evoluon, sen atendi personajn profitojn, krom la ĝojo pro plenumita tasko? Jen la dua kaj nepra gvidilo de d-ro Polgár: la morala kaj socia devo de edukisto, kiu per sia laboro kontribuas al la plibonigo de la homaro.

Per tiu verko ankaŭ la esperantistoj ricevis bonŝancon: intimiĝi al la ideoj de László Polgár, kiu meritas planan mondan rekonon de sia laboro.



Tio enorme plirapidigas la ludon, kaj streĉas la atenton, venki kaj malvenki ja tre proksimas. La movoj de la figuroj estas similaj, tamen sekve de la geometrio pli liberaj. Ekz. la ĉevalo, starante meze de la tabulo, povas moviĝi anstataŭ 8 al 12 fakoj. Tiel la ludo fariĝas pli dinamika. Per lotumada vicigo de la oficioj oni povas enigi ankaŭ hazardon. El bonŝanca komenca pozicio de la oficioj la blanka povas matigi per unu movo.



Mi multe okupiĝas pri infanoj, kaj rimarkas, ke ĉe la stelsako ilia fantazio pli libere moviĝas, donas eĉ multajn variaĵojn, pri kiuj mi mem ne pensas. Per la komenca pozicio de la oficioj oni povas grave influi la pluan disvolvigon de la partio. Pli oftas kombinoj kun oficroferoj, do oni devas pli atenti kaj travidi la momentan situacion. En lernejo ĝi estas pli facile instruebla, ol tradicia ŝako. En Budapeŝto ĝi estas instruata de kvar jaroj kun tre bonaj rezultoj. En televido ĝi povas esti pli bone disvidebla pro ĝia mallongeco. La stelsako estas ludebla ankaŭ en interreto (www.kossuth-klub.hu/~sakk/ <<http://www.kossuth-klub.hu/~sakk/>>). Oni aranĝis jam ĉ. 40 konkursojn, ankaŭ internaciajn.

D-ro László Polgár



Modo kaj etiko: por evoluo daŭrebla

de Kitaro Ibilisi

En oktobro 2006 la tria Salono de la etika modo aperis en Parizo. Modo pli kaj pli aliĝas al sociaj projektoj, per specifaj iniciatoj. Kaj subteni metiistojn en la hinda ebenejo aŭ la anda montaro tute ne signifas promeni sarie aŭ ponĉe.

Prioritata estas la estetika valoro de la objektoj. Nur tiel oni igas la publikon kaj konsumanto kaj aganto, laŭ etiko en la acetado, resumas Isabelle Grandval, pimpa francino kiu distribuas siajn produktojn sub la marko ZaZa Factory. Startinte kiel aktivulino en la homhelpa sfero kaj en la internacia komerco, en Birmo ŝi sukcesis kunmeti kreemon, tradiciajn konojn,



AOI: robo tajlita el iama kimono –
reciklado de japana silko

aktualecon kaj longdaŭran socian projekton. *Kondamnante la birman reĝimon, la internacia komunumo kaŭzis la mizeron de la plej fragilaj: terkulturistoj, artmetiistoj, virinoj kaj infanoj. Se ni valorigas ilian scipovon en brodado, iliajn rarajn materialojn, kiel certajn ŝtonojn, adaptante ilin al nia gusto – ĉiuj gajnas.*

Nuntempe Isabelle Grandval vendas mane broditajn mantilojn kaj skarpojn, elegantajn kolierojn kaj retikulojn, kiujn produktas birmanoj.

La ideoj de Rianne de Witte, 39-jara, el Nederlando, atutis en la Salono kaj en la modbutikoj. Per senriproĉa prilaboro de la materialoj ŝi pravas, ke etika modo ne estas alibio por submarko.

Althéane partneras al Thea, NGO aktiva en la Filipina insularo por provizi virinojn per hejma artmetiado. El tio rezultas la revalorigo de blankaj noktoĉemizoj tre elegante broditaj, pri kiuj niaj avinoj estus revintaj.

Teksoreciklado grave rolas en la etika modo. AOI, marko de la france-japana stilisto Tacuki Takino, reciklas altgame kelkdekjarajn kimonojn. *En Japanio, neniu virino surhavas alies kimonon, krom se tiun de familianino. Ni acetas la uzitajn kimonojn kaj ilin transformas, klarigas la reprezentanto de AOI. Kaj oni bone vendas: de la robo ĝis la miniŝorto.*

Ne nur vestaĵoj ĉe la pariza Salono: la marko *Deux filles en fil* inventis la memmunteblan sakon, el tre supla ledo. La tria mondo estas ankaŭ en Francio: ŝufabrikoj fermiĝis en Maine-et-Loire (la departemento de Kastelo Greziljono) kaj Claire Batairdière savis, se ne la postenojn de la uzinistinoj, almenaŭ amason da ledo por sakoj, tekoj, tornistroj tre praktikaj, diversaj kaj malmultekostaj: ideale por Esperantiano.



Rianne de Witte:
robo biologia

Plenigante la nenion



rolfo, profesia informdezaĵnisto, estas inspirita de zeno

pensoj pri zeno de rolfo

Zeno ne estas religio – spite al reaĵasertoj. Religio (el la latina *religio*: *re* = *re, ligare* = ligiĝi) okupiĝas pri la realproksimiĝo, religiĝo al la origino, la originulo, Dio. Tial religio rilatas plej ofte al la “aliflanko”, al la trans-eko, kaj okupiĝas – tamen ne ĉiam eksplicite – pri la vivo post la morto.

Kaj zeno kaj ties origino, budhismo, estas tiuĉiflankaj (dumvivaj) vojoj – prefere ni evitu eĉ la terminon “filozofio”. Zeno estas metodo por majstri la ĉiutagon kun leĝereco, sen la ordono kredi je io aŭ je iu ne rekte perceptebla (ekz. je iu dio aŭ Dio). Zeno okupiĝas pri la ĉiĉio kaj la nuno kaj la propraj spertoj – kaj konstruas sur tiuj.

Se islamano aŭ kristano aplikas zenon tio tute same malmulte ĝenas ties religiajn sentojn kiel alerni alian lingvon aŭ veturigi alian aŭtomobilon. Eĉ male, zeno povas helpi al li/ŝi kompreni pli bone sian religion aŭ konfesion.

La vorto zen devenas el la sanskrito, el la vorto *dhyāna*. La vorto migris al Ĉinio, kie ĝi estas skribe *chan'na*, poste transformiĝis al *ch'an* (pinyin-skribo: *chán*). Plue ĝi iris al la insularo Japanio, la fina celo, kie ĝi iĝis *zen*.

En Japanio estas krome uzata la vorto *zenjō*.

Signifo

La signifo de la sanskrita vorto *dhyāna* (kaj ankaŭ de la japana *zen*) estas “meditado”. En la vedaj skriboj (kiujn postlasis la prahinda kulturo) estas difinitaj plej diversaj specoj de meditado (jogo). *Dhyāna* estas unu el la ok vojoj de la jogo (*astanga-yoga*).

Difini zenon per nur unu sola vortotamen estas ne juste. En vortaro troveblas la sekvo: *Zeno estas priskribebla kiel spertoago je la pura observado, dum kiu la homa egoo kaj ties pensoj ne plu ludas rolon. Antaŭkondiĉoj estas, ke la meditante longtempe povas fokusi sian mensan energion sen esti perturbata/alpensigata. Per la koncentrado de tiu energio atingeblas la sperto/kompreno pri la integriĝo – la persono (falsa egoo) dissolviĝas kaj estas ekperceptebla la stato de sentempeco kaj la kosma kuneco per amo. Tiu ĉi leksikona klarigo estas certe iom “teknika”, sed sekvos ekzemploj...*

Jam elparolante ĝin, oni tute maltrafas la celon

Nan-y eh, 677-744

Origino kaj tradicio

Dhyāna estas jam priskribita ekz. en Bhagavadgito, unu el la plej filozofiaj verkoj de la hinduismo (ĉ. 5000-jaraĝa). La veraĵa origino estas serĉendaj en la

tempo antaŭ la enkonduko de la skriba lingvo en la regiono de la nuna Hindio. Difinita dato do ne ekzistas. La transdono de la scio okazadis persone de instruisto al disĉiplo en t.n. dharmo-linioj. La scio iris de hindaj majstroj ĝis Bodhidharma, pri kiu oni



diras,

ke li kunportis la

instruon en la 5^a jarcento al Ĉinio.

Post pluraj majstroj en Ĉinio, zeno disiĝis al diversaj vojoj (skoloj).

Ekde la dekdua jarcento, zeno transmigris al Japanio. La nuntempe uzataj terminoj ĉirkaŭ zeno plejparte devenas el la japana. La plej gravaj tradicioj zenaj estas *Rinzai* kaj *Sōtō*.

Ĉefa metodo de la *Rinzai*-skolo estas la menstrejnado per koanoj, t.e. ŝajne absurdaj enigmoj kaj anekdotoj. *Kān* – laŭvorta traduko: publika anonco – estas la montrado de mallonga, ekzempla ago aŭ la eldiro de iu zenmajstro. Iuj koanoj aperas kiel enigmoj. El la kompreno de kutima komunikado tiaj enigmoj aŭ anekdotoj ŝajnas paradoksaj kaj malkompreneblaj. Al enigma koano ne ekzistas absolute valida, ĝusta respondo. Ĉiu eltrovas por si mem, kio ĝustas. Do zeno estas ne taŭga por homoj, kiuj havemas antaŭfabrikatajn opiniojn pri ĉio. La verŝajne plej konata koana enigmo estas tiu ĉi: “Kiel sonas la plaŭdo de unu sola mano?”

Alia koan-anekdoto: La majstro

prenis bambuan bastonon dirante: *Se vi nomas ĝin “bambuo”, vi eniras la kaptilon de la vortoj; se vi nomas ĝin “neniu bambuo”, vi mensogas la faktojn. Kiel vi nomas ĝin? –* Iu disĉiplo antaŭenpaŝis, prenis la bambuon, disrompis ĝin kaj disforjetis la erojn.

La respondo al iu koano fontas el senantaŭjuĝa percepto-kompreno pri la naturo.

En la *Sōtō*-skolo la emfazo troviĝas je la meditada praktikado, precipe de la *zazen*. Tiu sidkontemplado funkcias jene: la zenpraktikanto sidas trankvile kaj provas malpleniĝi sian menson. Farante tion li rapide komprenas, ke tio estas malfacila tasko, ĉar daŭre alŝvebas novaj pensoj. La progresinto kapablas mastrumi tion, preterlasante la pensojn.


Kio do estas zeno?

Tiu ĉi estas la plej malfacila demando entute. Estas demando, kies provo respondi kontraŭdiras la ideon de zeno. Ĉar zeno ne liveras preparitajn konceptojn, opiniojn kaj dogmojn – sed baziĝas sur la individua, propra sperto.

Similaj demandoj al la supra estus: *Kio estas la vivo? Kiu kreis la universo? Kie finiĝas la universo? Kaj se ĝi finiĝas, kio troviĝas malantaŭ la fino? Kio estas la signifo de la vivo?*

Estas demandoj, pri kiuj okupiĝas la homaro jam eterne longe, kaj al kiuj ne ekzistas sciencje absolute findindaj respondoj. Do tiel falas reen al ĉiu unuopulo la tasko trovi la respondon

Simpla makulo de hafotaso kaj ĉiu ŝtono havas sian propran belecon – oni nur devas ĝin malkovri



La japanaj ĝardenoj estas kromnomitaj “zen-ĝardenoj”





Zeno forte influis
la arton ĝis la nuno:
japana ceramikajo.

validan por li mem – aŭ konscie, aŭ malkonscie, ekskludi el la vivo tiun demando-respondo-ludon.

Zeno do ne turniĝas ĉirkaŭ centra instruo – kiu ĉiukaze disiĝas al plej diversaj sektecaj opinioj iompostioje. Krome, en zeno ne estas guroj. Ja vivis (kaj vivas) tiel nomataj zenmajstroj, kiuj postlasis iujn eldirojn. Tiuj diraĵoj troviĝas pli sur la flanko de enigmigo, anekdotoj kaj versoj ol sur la flanko de konkretaj solvoj kaj instruoj aŭ reguloj.

La zennovulo do helpe de tiuj eldiroj pensadu kaj mem trovu la solvon – aŭ tute rezignu pri la pensado. Ĉar estas ekzakte tiuj demandoj supre menciitaj, pri kiuj ni neniam ricevos finvalidan respondon. Pli verŝajnas, ke provante ricevi ĝin ni iam perdas la inteligentecon.

Citaĵo el la libro *Zen-Worte vom Wolkentor-Berg* (Zenvortoj el la nubporda monto) de Urs App pri zeno: *Transsendado ekster ĉiu doktrino, kiu bazigaĝas nek sur vortoj nek sur skribaĵoj.* Rekta indiko al la homa koro: *Kiu rigardas sian propran eston, tiu estas vekiginto* (budho).

La malpleno, la nenio, la nirvano

La celo de zeno estas atingi la staton de la nenio. Sed zeno ne celas la nenion de la nihilismo, kiu neas ĉion (eĉ la evidenton). La nenio de zeno signifas la malplenecon, la liberecon de sekulara maltrankvilo kaj de opinioj kaj konceptoj starigitaj de iuj personoj kaj transparentaj sen pridemandi kaj sen pripensi. El tiu nenio/malpleno oni sekve ĉerpas – el ni mem. De la interno eksteren, ne male, kiel kutimas esti en la vivo.

Tiel zeno estas profunde estovera (el la greka *esoterikós* = internaje) – en la vera senco de la vorto. Malfeliĉe la vorto esoter(ism)o nuntempe estas ofte

mise uzata, tial mi tute ne emas ĝin uzi ĉi tie.

Tamen, ĉar mi ja havas la eblecon, mi kaptu la okazon: kio estas larĝe disvastigata nuntempe kiel novepokismo aŭ esoterismo estas nenio alia ol ekzoterismo (“eksteraje”), kiu fakte estas la pura malo: iu (iu instruisto, guroo ktp.) diras, kiel estas. Vera esotero estus: mi sentas, kiel estas.

Tio estas, cetera, la kialo de la neekzistado de “sanktaj libroj” pri zeno: neniu Biblio, Korano, Torao – nur la sio, la memo, kiel labor- kaj referenc-instrumento.

Interna lumiĝo estas nomata *satori*. Estas tiam, kiam iu komprenis “ĝin”. Komprenis, ke ĉio estas provizora, maleterna, ke nur vere ekzistas la nuneco. Tio estas facile skribebla kaj teorie komprenebla – la praktiko estas tute alia. Tiu stato, *satori*, ne estas priskribebla. Nur tiu, kiu spertis ĝin, scias, pri kio temas.

Formo estas nenio alia ol malpleno – malpleno estas nenio alia ol formo

Koro-sutro

vin mem en la nuno kaj ĉi tie, kio ne estas facila afero. Ni homoj okupiĝas plej ofte aŭ pri la estonteco (“Morgaŭ mi devos fari tion kaj jenon ...”) aŭ pri la pasinteco (“Mi havis malfacilan infancon ...”). Sed en la vivo, pasinteco kaj estonteco ne reale ekzistas. Ekzistas nur la ideoj kaj pensoj pri ili. Kaj restas la nuno ĝuenda – sed ĉu ni vere faras tion?

Zeno strebas al tiu sperto de la nuno, kaj al simpleco. Eljeti ĉion el la vivo, kio ne apartenas al ĝi. Trovi trankvilon kaj forton en la simpleco.

Kiel menciite, zeno ne promesas al vi plenumigon en la transeco. Ĝi ne konsolas vin, sed volas vin helpi trovi

Zeno kaj arto

Zeno postlasis sian stampon en Japanio. En la 13a ĝis la 17a jarcentoj, en Japanio la zen-monafejoj iĝis la veraj centroj de la kultura vivo. Ekestis multaj vojoj (japane *do*) inspiritaj de la zeno: pentrado, kaligrafio kaj skribarto (*shodō*), poezio (precipe konataj estas la 3-liniaj versoj, hajkoj), floranĝado (*ikebana*, aŭ pli ĝuste flora vojo: *kado*), teceremonio (pli bone: tea vojo, *chadō*), miniaturaj arboj (*bonsai*), arkitekturo, arkapafado, luktaj sportoj, kompreneble ĝardenarto kaj

禪

La ĉinajpana
signo por zen

Viaj klopodoj ĝuste interpreti la vojon prokrastas vian mensan vekigon

Zenmajstro Wu-men

muziko. Senpretenda facileco kaj leĝereco, realeco, objektiveco, simpleco, pureco troviĝas en la centro. Kaj la influo estas seninterrompa ĝis la nuntempo kaj troveblas ekzemple en dezajnobjektaj modernaj.

Dum en la Okcidento iu artaĵo estas ĉiam finita kaj staranta por si mem, la japana ekvalento provas lasi al la

rigardanto spacon, en kiun tiu povas sin meti. Do ne temas pri findefinita arto enentanta grandan ŝarĝon de la artistia egoo. Zenarto atendas aktivan partoprenon sen ĝin perforte postuli. Per la reduktado de la uzitaj rimedoj, la rigardanto aŭtomate ricevas pli da spaco, en tiu li povas age efiki.

La beleco de la malpleno

Malpleneo ne necese signifas "nenio". Ekzemple, blanka (malplena) rando sur libra aŭ gazeta paĝo donas al la teksto optikan spacon, kio pozitive helpas la legadon. Per tiu malplena aŭ blanka spaco la zena arto laboras aktive. Nenio, kontraste al la plenigita spaco, kunportas streĉitecon, interludadon. Jino kaj jango parolas unu al la alia, bezonas unu la alian, kondiĉas sin reciproke.

Ĝislima sintezo – ideo de la zeno

Sintezigo kaj malpligrandigo al la pleje ebla – sen krei la senton, ke io mankas, ankaŭ tio estas zen. Jam longan tempon antaŭ la apero de la malgranda aŭto *smart* (iama slogano "reduce to the max", aŭ pli trafe: "rtm") en Japanio oni komprenis, ke malpli havas la potencon esti pli. Bele ilustrigas tio per la hajkaj poemoj, kio estas 17-silabajoj 3-liniaj, ordigitaj 5-7-5. La plej konata hajko estas tiu de la verkisto Bashō (1644–1694):

*Furu ike ya
kawazu tobikomu
mizu no oto*

De ĝi ekzistas multnombraj tradukoj.

*Malnova laget'
Raneto saltas enen
Gluglas la akvo*

*Antikvakvaĵe
Mi aŭdas ranon salti
Ŝpruc' – kaj resilient'*

Kvankam tiu poemo estas tiom facila, simpla, ĝi kreas riĉan bildon en la menso.



*Supre:
la nenio,
kiu estas
pli ol nenio ...*

Ankaŭ bestoj konas inferon



de Elena Grisafi

Mia rumana aventuro finiĝis. Tempas reveni hejmen, al la ĉiutaga vivo...

En la revenmomento, ĉiam oni penas starti: malgraŭ la hidajtoj kaj la malespero viditaj en ĉi tiuj tagoj, la sentoj puŝas al restado: estas tiom por fari ĉi tie!

Mi startas el Bukareŝto dirante al mi mem, kiel ĉiun fojon, ke mi nepre revenos, kaj cirkaŭbrakante Andreion mi promesas ke tio okazos baldaŭ...

En Italio, ĉe la Malpensa flughaveno, malbona novaĵo: la flugo por Ĝenevo estas nuligita kaj mi povos foriri nur vespere. Ses horoj da atendo...

Mi serĉas sidlokon: la atendhaloj plenplenas, ŝajne multaj flugoj prokrastiĝis. Fine mi trovas unu el tiuj foteloj kie oni povas kuŝi kaj eventuale iom

dormeti. Min frontas granda ekranio kie glitadas koloraj reklamoj, en kiuj ĉiuj belas kaj feliciaj, la vivo aspektas perfekta kaj tute senproblema...

Kaj mi ne povas ne pensi pri la ĵus pasintaj dek tagoj, pri ĉiuj bestoj vivantaj ĉe la rubejo, pri la mizero, pri la multaj vizaĝoj kie legeblis mil historioj, mil diversaj destinoj, pri la inundo de la rifuĝejoj, pri la malespero de Sara...

Mense mi revenas al la unua tago de mia vojaĝo: Bukareŝto-Cernovodo trajne. Varmas, malgraŭ la malfermita fenestro, la vojo estas longa kaj por min distri mi rigardas la pejzaĝon, kiu rapide forglitas. Kampoj pentritaj per la helianta flavo kaj la tritika verdo, padoj zigzage tra la kamparo, vilaĝoj el kotaj kabanaj, ŝtonminejoj kun ciganoj plenigantaj ĉarumojn per blankaj ŝtonoj... la ĉaroj plenas ĝis nekredeble kaj la skeletaj ĉevaloj stumbblas sub la vipobatoj de senkoraj homoj... mi sentas tiun nekompreneblan violenton kiel propran vundon.

Rumano, Danuba delto: pro la malfacilaj vivkondiĉoj oni amase forjetas dombestojn. Por pretervivi tiuj sovaĝiĝas.

Precipe ĉiurazaj hundoj, tra la jaroj grandskale reproduktiĝis kaj fariĝis minaco por la medio kaj eĉ por la homoj, ankaŭ pro la disvastigataj malsanoj. La rumana registaro de tempo al tempo organizis "pogromojn", kiuj murdis milojn de tiuj povraj bestoj, sed tio ne multe utilas.

Nura ebla rimedo por imponioma reveno al normaleco: steriligo, kaj por la sovaĝaj kaj parte por la domaj. Enorma, malfacilega laboro!

Necese ligita al homaj bezonoj, ĉar oni ne povas fermi la okulojn antaŭ altaj pezaj vivproblemoj kiuj ŝokas kiam oni venas al tiu regiono por plenumi la antaŭviditan mision...



La suno malrapide forsinkas, venas la nokto kaj malhelo kaŝas la pejzaĝon. Mi duonvidas kelkajn lumojn en foro, la reflektorojn de la aŭtomobiloj kaj la lampinojn de la stacidomoj ĉe kiuj la trajno haltas... jen ni atingas Cernavodon, kie atendas min Luko kaj Viviano, miaj kunuloj en tiu ĉi aventuro.

La laboro ĉiam multas, ne nur en la bestrifugejo de Cernavodo sed ankaŭ en Meĝidio, kie de kelkaj monatoj funkcias buskliniko kaj oni steriligas multajn bestojn ĉiutage. Ni decidis ke ni dividos nin inter la du urboj, por esti kiel eble plej efikaj kaj helpi tiujn, kiuj plej bezonas.



Ni laboras 10-12 horojn tage, varmo kaj humideco igas la laboron ekstreme peza, ne maloftas misfartoj. Sed ni rezistas, fortigitaj de la penso ke danke al nia ĉeesto multaj bestoj estos steriligitaj kaj kuracitaj: pliaj paŝoj survoje al la solvo de la granda problemo de hunda sovaĝiĝo, kaj eble al la sentemigo de la ĉi-lokaj homoj.

Ne maloftas urĝaj kazoj kaj ofte la posedantoj portas siajn bestojn al la kliniko kiam ilia sanstato estas jam senespera. Ni ĉiam klopodas fari ĉion eblan por ilin savi: tamen, kvankam en la kliniko la strukturoj enorme progresis, ofte mankas tiuj diagnoziloj aŭ tiuj medikamentoj kiuj ebligas la tujan komprenon kaj solvon de la problemoj. Al la veterinaroj kiuj aktivis ĉi tie, en tiaj ekstremaj kondiĉoj, iras mia granda admiro – samkiel al ĉiuj aliaj laborantaj en la bestrifugejo, ĉiam purigantaj, ordigantaj kaj zorgantaj pri la bestoj malsanaj aŭ resaniĝantaj. Viviano donis al ili grandegan helpon. Mi mem estas la asistanto de Luko, itala veterinaro jam veninta milfoje en Rumanion, kaj danke al li mi povas praktiki kion mi estas



lernanta en mia kurso pri veterinaro flegado.

La aktivado de la buskliniko estas vere entuziasmiga: ni laboras, sub polica protekto, en la



plej malriĉaj kvartaloj de Meĝidio, kie la homoj vivas en ekstrema mizero kaj la sola leĝo estas perforto.

Ne hazarde la homoj kiuj alportas siajn dombestojn por ke ili estu kuracataj, laŭeble tenas ilin inter siaj brakoj.

Kiam buso alvenas ĉiuj alvenas festeme. Sed kiam la veterinaroj komencas operaci falas la silento kaj la infanoj alproksimiĝas por rigardi kaj komentarii. La laboro estas vere intensa en la buskliniko kaj la steriligoj sinsekvas senhalte, spite al la malbonaj laborkondiĉoj. Spaco mankas, la lumo ne estas la ideala kaj la varmo neelteneblas. Sed ni laboras kun entuziasmo kaj ĝojo, inter la veterinaroj kaj la rumana teamo tuj ekestis kamaradeca akordo: Vali kaj Alina estas vere bonegaj kuracistoj, kompetentaj kaj sentemaj.

Sur la vizaĝoj de la plenkreskuloj kiuj atendas sian vicon ni legas ne nur silvolon kaj dankemon sed ankaŭ malfidon: kelkaj fine ne konsentas steriligi siajn bestojn, kvankam ĉiun kuracistan helpon ni donas senpage.

Abrupte, ŝtormo frapas la regionon. El la Cernavoda



rifugejo alvenas dramaj novaĵoj: duonmetre alta akvo invadis la lokon, la situacio estas eĉ pli malbona ol okaze de la pasintaprila inundo.

Ni ĉiuj ŝvitas por savi la bestojn, kiujn oni translokigas al la areoj ankoraŭ ne malsekaj kaj al suprenaltigitaj dometoj aŭ kaĝoj. Tabulojn oni metas en la katejo por ebligi al la teruritaj loĝantoj fuĝi al seka loko, kaĝojn oni levas, se ne eblas transporti ilin al pli altaj ejoj. La sablosakoj kaj la suĉpumpilo ne sufiĉas por malebligi ke la akvon eniru la rifugejo, kies muroj ĵus sekigis el la antaŭa inundo. Ni plaŭdas en kota akvo, malbonodora kaj malvarma, ni plenforte agas por eviti la plejmalbonon, sed la akvo levigas nehaltigeble kaj senespero ekaperas. Malvarmas, mi havas la fingrojn ulceritaj pro la longa restado en la fetora akvo, sed mi ne povas cedi. Sara bezonas nin ĉiujn, ni devas resti lucidaj por taŭge agi. Se nur ni havus plian pumpilon! Sed nepras elturniĝi: malgraŭ niaj helpopetoj neniu

venas nin helpi, nek la aŭtoritatoj, nek la pumpiposedantoj, kvankam ni pretus pagi. Daŭre pluvetas kaj la akvonivelo ne malaltiĝas. Do ni decidis fosi kanalon por irigi la akvon el la rifuĝejo al kampo preter la digo, kaj tio iom funkcias. La sekvan tagon fine alvenas dua suĉpumpilo, kiu konsiderinde malaltiĝos la akvonivelon, kaj ni povos tiel komenci la riparon de la konstruaĵo, duan fojon ĉijare.

Sajne la loko estas tre facile



inundebla kaj tion la urbestro kaŝis al Sara, kiam temis pri la elekto de tereno por la konstruo de la bestrifugejo. Nun ne plu eblas foriri, tro da mono estis elspesita, oni petos hidrogeologian ekspertizon por trovi eblajn rimedojn. En Cernovodo ne estas tempo por enui, ĉiutage nova defio kaj mil solvendaj problemoj!

Malrapide Cernovodo ŝanĝiĝas, kaj la komunuma estraro klopodas igi ĝin pli "normala" – restrukturlaboroj estas farataj, sportejoj ĵus ekfunkciis kaj estas subĉiela kinejo – eĉ la sovaĝiĝintaj hundoj, danke al la senlaca laboro de la



rifuĝejo, draste malpliigiĝis kaj la restintoj, ĉiuj steriligitaj kaj vakcinitaj, estas zorgataj de kelkaj bonvoluloj.

Se la situacio vere pliboniĝis, la vivnivelo de la plejparto de la Cernavodo-loĝantoj restas nepenseble malalta kaj en la malriĉajn kvartalojn oni ankoraŭ eniras je sia propra risko. En tiuj gettoj nur la perforto regas kaj la eksterlandanoj ne estas la plej bonvenaj. Infanoj nin alfrontas per obscenaj gestoj kaj fivortoj, la sola farendaĵo niaflanke estas ignoro. La akcepto de la plenkreskuloj ne estas pli bona kaj ofte al la parola violento aldoniĝas la minaco de la fizika. Feliĉe ni estas kun Sara, kiu sukcesis ligi pozitivajn rilatojn kun kelkaj virinoj kiuj okupiĝas pri la bestoj en la kvartalo.

Ili rakontas al ni hororajn historiojn pri mistraktado al hundoj kaj katoj. La plenkreskuloj estas negativa



modelo por la infanoj, kiuj amuziĝas frakasante la kapon de hundoj per ŝtonoj aŭ per kontraŭmura bato... Pro la malfacilaj rilatoj kun la kvartalanoj la steriliga laboro ĉi tie apenaŭ komenciĝis, restas preskaŭ ĉio por fari. Sed kelkaj amas la bestojn kaj kuras al ni kun siaj protektaĵoj inter la brakoj, petante ke oni ilin operaci, ĉar ili komprenis la bonecon de la solvo.

Kaj proksime, ĉe la rubejo, hordoj da vagantaj hundoj kaj aliaj bestoj vivas in-

ter la putraĵoj. Ili estas malfacile alireblaj, kaj por ilin kapti necesas anestezan pistolo.

La rubejo estas horora loko, la rubo etendiĝas ĝis nevideblo al la suba valo. Tie estas ĉio, de la tipaj forlasitaĵoj de konsumisma socio al bestaj kadavroj. La stinko de la rubaĵoj, de bruligita plasto, de putranta karno estas neeltenebla.

Toksodoro venenas la aeron, kie svarmas kriaĵ korvoj nigraj. Fore aŭdiĝas bojado de hundoj kiuj kverelas inter si por lokposedo. Nigra formo siluetas inter la rubaĵoj: estas laktobovino, kiu trankvile paŝas inter plastaj boteloj, printilaj toneroj, ĉifonoj kaj bestkadavroj, serĉante ion por sin paŝti.

La rubejo estas surreala loko, vera danteska infero, spaco koŝmara el la sciencifika romano aŭ el dokumentaro pri la mizero en la tria mondo. Necesas volforto por konvinkiĝi ke ni ne estas sur la sceno de postatombomba filmo: ĉio ĉi estas reala, ĉi tie kaj nun en Rumanio, kiu en 2007 estos parto de Eŭropa Unio.

Mi malbonfartas, kaj volus kribi pro indigno, senluziigo, nepovo, kolero pro la maljusto kiu regas nian planedon! Mi volus ke tio estu nur koŝmaro, el kiu vekigi kun senpezigo, sed la kadavro de ĉevalido, rigida en nenatura pozo, katenas min al la horora realo de la rubejo.



Mi skuigas el la nebulo de la rememoroj: ankoraŭ mi estas en la flughaveno, sur mia atendeja fotelo. Frontas min la ekrano kun siaj bildoj de vivo el plasto... jen ni estas, preskaŭ hejme – sed por mi ne plu estos same. Ene de mi restos ĉiam la bildojn de la rubejo, de la homoj, de la rigardoj de la renkontitaj bestoj, de la inundo ĉe la rifuĝejo... bildoj duraj, malĝojaj, angorigaj.

Cernavodo markas, per marko neforigebla. Tamen mi volas kredi ke por ni "solidareco" ne estas nur sinsekvo da literoj en la vortaro, sed konkreta valoro kiu inspiras niajn ĉiutagajn agojn kaj paŝas nin helpi la vivdronantojn. Homojn aŭ bestojn.



La ĵus aperinta aŭgusta numero de *Kontakto* estas dediĉita al la ĉeftemo "Egalaj rajtoj – feminismo". Fakte al feminismo estas dediĉitaj nur kelkaj paĝoj, sed interalie aperas la deklaro de FEM okaze de la Oka de Marto 2006.

La tradicie renoma socikultura revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo aperigis nian deklaron ankaŭ sekve de rekta korespondado kiun nia redakcio havis kun la koleginino, Eugenia (Ĵenja) Amis, ukrainino vivanta en Usono. Ŝi montris sin disponebla kaj interesita: la rilatado daŭros, unuavice per intervjuo al la prezidanto de FEM.

Sola bemolo en la afero estas la manko de indiko pri la adreso de FEM; sed almenaŭ la dokumento aperis.



Subita frosto
faligis ĉiujn foliojn de morusujo
la brune ruĝe velkinta foliaro
rande brodiĝita de brila glacio
sterniĝas ĉirkaŭe
kvazaŭ forlasita robo

Eksplode ravas
glataj linioj
de nudaj brantĵoj
dancantaj al ĉielo

MFCR



Klara respondas al legantinoj

La verda partio pri prostitucio

*Prigenra Observejo de la Eŭropaj Verduloj, www.eggogreens.org

Prostitucio estis temo de mi rapide vizitita antaŭ du numeroj. Prave kelkaj legantinoj petis min reveni al ĝi.

La laborgrupo pri seksa egalrajteco de la Eŭropa Verda Partio en 2005 debatis ĝuste la saman temon. En aprilo 2006 el la debato fontis Konsilia dokumento, kiu prezentas diversajn alirojn al la problemo kaj diferencajn poziciojn interne al tiu partio. Fakte la kataluninoj, kiuj kontrolas la retejon de *European Greens Gender Observatory*,* afiŝis nur propran gazetaran komunikon, ne la dokumenton.

La katalunaj verdulinaj emfazas, ke *la problemo de prostitucio ne situas ĉe la virinoj, sed en la mafioj, kiuj ekspluatas senpune novan klason de sklavinoj ĥiun la globalismo helpas krei*. Konsekvence, la prostitucio bezonas reguladon bazitan sur la strebo defendi la homajn rajtojn de la prostituinoj. Tio signifas, ke *ne eblas bazi sin ĉefe sur la kriterioj de publika ordo*. Laŭ la kataluninoj *ne estas prioritato garantii ke prostituado okazu endome anstataŭ surstrate, aŭ krei tolerzonojn, des pli se la virinoj ne povus mem mastrumi la fermitajn domojn*.

Poste la komunikado grundas en polemiko pri kiu rajtas kion por elpensi la normojn pri prostituado en Barcelono. Por fine akuzi la ne tre originalan ideon formi komitaton *ad hoc*, kaj denove sinki en la demandojn pri kiu eniri ĝin.

Sincere, antaŭ tridek jaroj mi legis pli interesajn ideojn ĉe Pia Cove kaj la kolektivo de Pordenono (Italio); eble ĉar temis pri elektivaj prostituinoj kaj ĉar la tiama feminismo estis en ekspansio.

Sed la plej interesan proponon mi legis en romano de Isabel Allende, kie cetere (kaj tute aliloke) rolas ankaŭ esperanto, la lingvo de la spiritoj. En *La domo de la spiritoj* la meretrico persvadas klienton prunti al ŝi monon por fondi koope-

rativon de prostituinoj, kaj tiel mem mastrumi sian entreprenon. Efektive la iniciato havas sukceson.

Mi konvinkigis ke neniu aktiveco tiom bezonas virojn, kiom prostitucio: jen la kliento, jen la prostituoto mem (ofte viroj prostituigas kun viroj), jen la ekspluatanto, jen la administranto – eĉ la kuiristo. Jes, la kuiristo: mia itala onklo rakontis, ke laŭleĝe la bordeloj devis esti registritaj nome de virino, kutime maljuna ĉiesulino; kaj ŝia edzo aŭ kunulo ĥutime estis la kuiristo. Fakte la bordeloj tenis ankaŭ restoracion, *kie oni manĝis ne malbone*, laŭ mia onklo, profesia kelisto.

Tial mi konvinkigis ankaŭ ke, se prostitucio evoluos al pli moderna formo, nepre devos reduktiĝi la loko okupita de viroj, tiel ke ili estu nur klientoj, kaj la aktiveco devos esti ekskluzive en la manoj de la virino kiu liveras la servon. La du kondiĉoj fakte koincidas.

Eble nenie kiel en la prostitucia mondo oni perceptas la masklismon, kaj ĝuste en la epoko de la globalismo. Pri tio la verdulinaj absolute pravas. Batali kontraŭ tio estas multe pli malfacile kaj danĝere ol promocii la rajton de lesbaninoj en la burĝa postindustria socio. Kaj la batalo por la evoluigo de prostitucio estas certe avanfronto por feminismo; kie necesas la kunlaboro de viroj, paralele al la ofta bedaŭrinda komplikeco de virinoj kun la ekspluatistoj kaj sklavistoj.

Kaj necesas agi. La idealo de socio sen prostituado, ĉar sekulariĝinta kaj sekse libera, estas nur mito. La fenomeno ekzistas en ĉiu epoko kaj ĉia socio. La fokuson ni devas meti al la interesoj de la virino: libera en la elekto, libera de ĉia ekspluato, preventita kontraŭ mal-sanoj kaj dependoj, faciligata en la recikligo al senseksa profesio. ☞



Nomu ĝin kiel vi volas, ĝi restas abomenaĵo

de Leendert C. Deij

En Nederlando okazas debatoj inter islamanoj kaj aliaj, por ke kresku reciproka kompreno. Plejparte la debatantoj partoprenas ne por kompreni, sed por komprenigi, ke nur ili pravas. Por kompreni ne sufiĉas kvazaŭ prokurore aŭskulti la argumentojn de aliaj kaj selekti tiujn, kiuj estas facile refuteblaj. La debatantoj devus krei komunan identecon. Sed tio montriĝas tre malfacila, ofte preskaŭ neebla. Niaj mondoj estas tro malsamaj.

En Nederlando iuj islamanoj konvertiĝis al la kristanismo kaj inverse iuj kristanoj fariĝis islamanoj. La ŝario kondamnas renegaton al morto. Laŭ la nederlandaj islamanoj oni devas ne mortigi, sed homo, kiu ŝanĝas sian religion, tamen meritas punon. Kial puni? Imamo klarigas: *Transiri al alia religio ŝokas islamanon tiel same, kiel ŝanĝi sian sekson. Imagu, ke pro transseksemo via filino fariĝas viro!* Min ŝokas nek la transiro al alia religio, nek la transiro al alia sekso. Pri tio ĉiu homo mem decidus. Mi ne povas senti la ŝokiĝon de islamanoj.

Inteligenta nederlanda paro devenas el Maŭretanio. Ili havas filineton. Pri tranĉo de la seksorgano certe ne povas esti parolo. La avino el Maŭretanio skribas: *En Nederlando oni ne permesas ekscizi la knabinon. Venu al ni. Mi estos feliĉa, kiam ŝi estos pura!* Evidente estas bona avino, kiu sincere amas sian nepinon. Mi estas ŝokita.

En Svedio oni ĵus kondamnis patrinojn al dujara restado en malliberejo, ĉar ŝi lasis tranĉi sian filinon. Kripligi infanon estas puninde. Mi tamen ne kredas, ke enkarcerigo forigos la malbonon. Kaj ĉu tiamaniere oni ne punas ankaŭ la infanon, kiu dum du jaroj malhavos sian patrinojn? Pli necesa ol puno estas prevento. Kiel preventi? Per grandskala informado kaj subteno al islamaj organizaĵoj, kiuj en islamaj landoj batalas kontraŭ la – laŭ ni – abomeninda tradicio. Hodiaŭ ni turnu la rigardon al Maŭretanio.

“Kiom eble plej dika kaj ronda” ankoraŭ estas la idealo de virina beleco por maŭritanaj maŭroj. Pro tiu idealo knabinoj estas perforte grasigitaj de siaj familianoj ekde la naŭa jaro. La arabaj maŭroj, kiuj dominis la loĝantaron dum jarcentoj, tradicie ekspluatis sklavojn por la mastrumado kaj la propraj edzinoj pasigis la tagojn en nenifrado. En tiu lando, kie ofte regas malsatego, pezaj filinoj kaj edzinoj ankoraŭ estas simbolo de bonstato. Sed la grasigado estas kruela. Knabinoj dronas en la laktomaro, kiun ili ĉiutage devas trinki. Eĉ foje iu mortas, sufokita de stomaka hernio.

En la araba cirkumcido estas *tahur/ tahara*, el la verbo *tahira*: esti pura, senmakula. El la sama verbo devenas virinaj antaŭnomoj en islamaj socioj, ekz. la persa *Tahire*.

En la svahila virina seksmutlado, estas *ukeketaji*, el la verbo *keheta*: cirkumcidi virinon. Eblus diri ankaŭ, per arabe devena radiko, *tohara ya (kwa) wanawake*.

En la hebrea cirkumcido (kiu rilatas nur al virinoj) estas *Brit mila*, kiu signifas aliancon aŭ pakton, ĉar religie cirkumcido memorigas la aliancon inter Jehovo kaj la individua viro. La radikon *mila* (infinitive *lamul*: ĉirkaŭtranĉi) laŭbezono oni ekuzis ankaŭ por virinoj, ĉar tiu koncepto estas fremda al la hebrea tradicio kaj sekve ne havas propran terminon.

Efektive la forigo de la klitorio (ekscizo, klitorrektomio) estas popole miskonata *virina cirkumcido*. Ekzistas malpli drastaj intervenoj ĉe la vulvo analogiaj al (vira) cirkumcido, en la etimologia senco de *ĉirkaŭtranĉo*.



Kiam ili estas ĉirkaŭ dudek-jaraj, ofte aperas seriozaj problemoj pri renoj, galŝtonoj, arteria hipertensio, diabeto kaj genua artrito. Kiam sesdekjaraj, aŭ pli frue, virinoj ne plu povas stari.

Lokaj organizaĵoj de virinoj aranĝas kampanjojn por emancipado, kontraŭ la grasigado de knabinoj, klitorektomio kaj poligamio. *Post la sendependeco en 1960 la stato de virinoj feliĉe pliboniĝis per gigantaj paŝoj*, diras Aissata Kane, feministino, eksministro pri Sociaj Aferoj kaj direktoro de *Asocio de Maŭretaniaj Franclingvaj Virinoj*.

Lau la opinio de la francaj koloniaj regantoj, maŭretaniaj knabinoj ne bezonis frekventi lernejon. En 1960 eĉ ne unu procento de la knabinoj ricevis instruon. Nun la knabinoj estas majoritato en lernejoj kaj universitatoj. Tamen inter la sesdek kvin procentoj de analfabetoj ankoraŭ troviĝas precipe virinoj. *Ankaŭ post la sendependiĝo la lernejo restis iu luksa por knabinoj*, diras la politikistino.

Lau oficialaj ciferoj el 2001, el ĉiuj kvin maŭritaniaj virinoj unu estas markita per *gavage* (grasigado). Tiu tradicio nun malofitiĝas pro la migrado el la kamparo al la urbo, la urbanigo de nomadoj kaj la plivastiĝo de la instruo. En 1960 sepdek procentoj de la loĝantaro estis nomadoj; nun nur dek kvin procentoj. Pro la kresko de la modernaj amaskomunikiloj



estiĝis alia imago pri virinoj. Aissata Kane diras: *Ni volas havi egalajn ŝancojn, egalan salajron kaj egalan povon. Jes, ni volas ankaŭ hundecdi. Kolonelo Ould Vall promesis, ke la virinoj ricevos dudek procentojn de la seĝoj en la nova parlamento. Sed eble tio estas nur popolfata ludo kaj ni estos nur neelekteblaj kandidatoj. Ankaŭ la advokato kaj aktivulino por homaj rajtoj Fatimata Mbaye estas pesimisma. Tion longe, kiom la justico kaj la publikaj oficistoj ne estas sendependaj de tribestroj kaj de la maŭra elito, ĉiuj reformoj, kiuj kontraŭas iliajn privilegiojn, kiel ekzemple abolo de sklaveco kaj malpermeso de poligamio kaj "gavage", estos tre malfacilaj. Aissata Klarigas, ke lau la Korano viro povas havi kvar edzinojn, sed ke unu edzino sufiĉas, se li volas esti vere justa al ŝi. Jam antaŭ multaj jaroj la tunizia prezidento Bourguiba tial malpermesis poligamion. Sed ni ankoraŭ ne tiom progresis.*

De tempo al tempo eksministro Kane voĉlegas el la Korano antaŭ la nacia televido. Kiel nigra islamano kaj unua okcidenta-afrika virina ministro ŝi estas tre ŝatata. Antaŭ juĝistoj de religiaj tribunaloj ŝi pledis por ke poligamio ne plu estu rigardata kiel islama devo.

La generacio de Kane kredas, ke la ekscizo de virinoj kondukas al plena ĉasteco. *En la tempo de mia infanaĝo ĉiu knabino estis tranĉita. Mi bezonis tre longan tempon antaŭ ol mi povis kontraŭi la hutimon, sed nun ne plu ekzistas reira vojo. La tranĉado devas halti! La registaro donis iom da libero por diskuti pri malpermeso – diras la aktivulino – kaj pluraj imamoj proklamas en sia prediko post la vendreda preĝado, ke certe ne estas islama devo tranĉi la seksorganojn de knabinoj. Sed daŭros longe antaŭ ol ni atingos la celon.*

Aissata Kane devas agnoski ke ankoraŭ persistas multaj antaŭjuĝoj. Temus pri respekto al tradicio de jarcentoj: ke post tranĉado knabino fariĝas obeema kaj ĉasta kaj similaj argumentoj. Lau ŝi tro malmultaj virinoj faras al si demandojn pri la sentoj de virinoj, pri la sekvoj de la infektoj kiuj ŝin ofte trafas kaj kiel ŝi poste suferas dum akŭso.

Krome, la iama ministro scias kial ne estos facile atingi firman malpermeson. La tranĉado donas multe da mono. La familioj de la ekscizistinoj estas alte respektataj. *Exciseuse* estas hereda honoritolo.

Dank' al la lasta Femina ni restu en Oriento – sed ni ŝanĝas la traktokampon, ĉar la aŭtuna numero de la revuo "ne nur por virinoj" traktas la temon *Oriente kaj religie*. Temas pri numero riĉa je interesaj, kelfoje ŝajne provokaj kaj diskutvekaj materialoj, kiuj ebligas rigardi kiel oni konceptas la mondon per feminismaj okulvitroj.

Sed bonvolu atenti, kiel atentigas la redakcio, "por aboni *Feminan* ne necesas aliĝi al Feminisma Esperanta Movado".

Dank' al la aŭtuna numero la leganto havas la eblecon konatiĝi kun multaj interesaj kontribuoj.

[sekvas komentario pri unuopaj artikoloj]

Tutecre multajn povas interesi la artikolo de Leendert Deij *Samseksemo kaj religio*. Fakte tiun demandon la aŭtoro eksplikas lakone tezante, ke antigejismo, same kiel antisemitismo, originas el la kristana kaj islama religioj, multe pli da atento donante al la fenomeno de samseksemo en Eŭropo, asertante ke gejfibio difendidas la kontinenton.

Min frapis lia malobjektiveco kun kiuj li traktas tiun problemon en orienta Eŭropo, deklarante ke *orienteŭropanoj publike ĉikanas, minacas kaj batas kaj piedfrapas geojn*. Tute kurioze kumulitaj estas la atakasertoj pri la situacio de samseksemuloj en Pollando. Mi deziras esperi, ke se estonte tiu serioza aŭtoro levis iun similan temon li pli serioze kaj amplekse uzus fontmaterialojn por pli objektivaj konkludi pri fenomenoj okazantaj en la ĉirkaŭanta nin mondo.

Barbara Pietrzak, 24 oktobro 2006
Radio Polonia, Esperanto-redakcio



Roberto la eksperto

de Berta Lenard

Roberto estis alta, blonda kaj svelta, ĥironia kaj skeptika, la tipo kiu flamigas la korpan deziron de ĉarmaj junulinoj – kiel tiun de Ticiano – sed ne lasas, ke stultaj sentoj tuŝu lian pacan animon. Se iu virino emis ligi sin al li por longdaŭra – eĉ: oficialigita – kunesto, li klopodis rapide liberiĝi de la belulino. Tiel okazis ankaŭ kun Helena, kiu verŝajne rigardadis jam nuptovestadojn en montrofenestroj kaj ofte revis pri serena familia vivo kun Roberto.

Tiutage ŝi sidis en profunda fotelo en la vasta vivoĉambro de Roberto, dece trinkante kafon kaj imagante sin edzino, kun beboj ludantaj ĉirkaŭ la felicia paro. Ŝi glutetis la kafon kaj rave ridetis. En Roberto naskiĝis suspektemo, kiu avertis lin pri la indo fari rapidan planon por saviĝo. Li iris al alia ĉambro kaj vokis Ticianan, kiu laboris tute proksime.

– ... Jes, estas mi, via Roberto. Kiun vestaĵon vi surhavas? Ha, tre bone, tre bone... Aŭskultu, faru al mi etan komplezon ... venu al mia hejmo por dek, maksimume dekkvin minutoj, miru pri nenio, kaj estu... hm... tre afabla... do montru vian amoremom al mi.

Ticiano alvenis post nelonge, montrante siajn belajn mamojn tra la adhera pulvero; ŝiajn gambojn emfazis minijupo kaj longaj botoj. Ŝi salutis Helenan kun malvarma rideto kaj tuj sidis sur la

genuojn de Roberto, ĉirkaŭbrakis lin, mordetis liajn orelojn, karesis lian kapon, proponis por reciproka kiso siajn sango-ruĝajn lipojn. Ŝi babilis, pepetis, laŭtigis la magnetofonon, prenis por si kafon ekfumis, deprenis libron de sur la breto laŭdis la pulveron de Roberto kaj la sandalojn de Helena kaj tiujn volis provi, sed trovis ilin tro grandaj, do ŝi ree okupis sian lokon sur la kruroj de Roberto, kaj ĉion ĉi ene de maksimume dek minutoj. Helena rigidiĝis kaj foriris post nelonge, dirante, ke ŝi volas ankoraŭ aĉetadi en la urbocentro.

Post kelke da tagoj Roberto ricevis de Helena leteron :

Kara Roberto,

Post tio, kio okazis hieraŭ en via hejmo mi estas ŝokita, kaj mi ne scias, kion mi pensu pri vi entute. Forlasinte vian loĝejon mi fuĝis en preĝejon survoje por esti sola kaj mediti pri ni du. Mi ne meritis tion, kion vi kaŭzis al mi kaj mi ne komprenas vin. Mi ne scias, ĉu iam ajn mi dezirus ankoraŭ esti via amata edzino kaj honesta patrino de viaj gefiloj... La bildo pri vi kaj pri nia estonto estas disŝirita kaj mi multe ploris pro tio kaj pro vi. Jes, ankaŭ pro vi, Roberto, ĉar mi vidis, ke vi eliris de la normala vojo, kaj vi elektis vivon malmoralan. Mi kompatas vin pro tio, ĉar tio ne taŭgas por serioza fratilo.

Ĉi-nokte tamen mi decidis skribi al vi, esperante, ke vi komprenas min, kaj vi rekonas la gustan vojon por savi vin kaj nian estonton.

Mi ne scias, kion ankoraŭ mi povus diri al vi...

Mi decidis ne peti de vi klarigon, sed se vi sentas tiel, kiel mi, kaj se vi pensas, ke vi havas ankoraŭ planojn kun mi, serĉu min... Se vi ne respondos, mi pensas, ke vi vere estas viro malserioza. Se niaj koroj denove retrovas unu la alian, mi promesas, ke neniam mi



mencios tion, kio okazis. Tiun hieraŭtan tagon mi metos en la tombejon, kaj denove ekfloros nia sincera amo, en perspektivo de jelaica familia vivo.

Kun amplenaj pensoj, via Helena.

La letero kortuŝis Robertson, ĝi estis vere tre bele skribita. Sed pro la varma amo de Ticiano kaj pro manko de tempo li neniam respondis.

Kvankam malofte, okazis, ke ĉirkaŭ Roberto malmultigis la junulinon amindaj. Foje eĉ entute. Tuj aperis iu el la veraj amikoj kun propono de matura, serioza kaj inteligenta virino. ...Ankaŭ ŝin forlasis la amanto, ŝi sentas sin tute sola...

Roberto tuj vokis la telefonnumeron por fiksi rendezvon por la sekva tago. Mi vidu unue la predon – li ruzis, kaj kelke da minutoj antaŭ la renkontiĝo (en la plej eleganta kaj multekosta kafejo – damne! – de la urbo) li alvenis aŭte kaj restis en ĝi. Pasis minutoj, kvaronhoroj, sed la priskribita sinjorino ne eniris en la kafejon. Ŝi jam nun malfruis – li registris. Post unu horo kaj kvarono li reatigis hejmen, reŝatis la televidilon por sekvi la daŭrigotan krimfilmon. Antaŭ la fino de la filmo sonoris la telefono, aŭdeblis nekonata virina voĉo. Ke ŝi atendis pli ol unu horon, en la kafejo, ne, ŝi tute ne malfruis, eĉ ŝi alvenis jam pli frue... Bone, morgaŭ, ni iru promeni (kial en multekosta kafejo, krome la promenado estas pli sana), frue posttagmeze (por ne maltrafi la vesperan filmon).

Ŝi estis ne malbela. Ankaŭ ne bela. Ne tre juna, vere, bone konservita, eble en la aĝo de Roberto, aŭ iom pli. Kaj habilema. Bonŝance, ĉar tiel Roberto ne devis ŝin amuzi. Ŝi montris eĉ fotojn pri la "viraĉo", la "viktimgisto", la "plej inteligenta", la "plej serioza, klera, terura, mensogema, malavara ĝentlemano" (sur la bildoj ŝi aspektis pli bone, ol nun) ...Kaj ili vizitadis ĉiusemajne operon aŭ teatron, aŭskultadis koncerton almenaŭ du tri fojojn monate... kaj poste ili iris vespermanĝi, certe en la plej elegantaj lokaloj, kaj al la maro ferii somere, kaj skii vintre...

Roberto terurigis. Ne. Li certe ne akompanos ŝin al teatro, de malproksime rigardos operojn, eĉ ne mencii koncerteojn. Krome li preferas hejme manĝi fazeolan supon, somere ne veturi pro la svarmo de turistoj, skii li ne scipovas kaj certe ne lernos. Sed li ne diris tion laŭte, nur en si mem, kaj rigardis la vojon en la barbaro, kien parki la aŭton por promeni iomete. Ie, ĉi tie devus esti simpatia bierejo, kie oni donas ankaŭ varmajn kolbasetojn kun mustardo. Kiam ili elatigis, ekpluvetis. La sinjorino daŭre pepis, Roberto mute sekvis ŝin. Almenaŭ mi ekzameni ŝian figuron... Sed multon li ne povis konstati, ĉar kovris ŝin tro longa kaj tro larĝa mantelo kontraŭpluva. Li ĉiam abomenis tiaspacajn vestaĉojn...

Por ŝanĝi la temon pri la sendube perfekta kavaliro – kies sola malvirto estis, ke influas lin juna putinetto – Roberto metis sian brakon sur ŝian ŝultron. Ŝi ekmutis. Kiel baldaŭ evidentigis, Roberto eraris la vojon, kaj ili iris pli kaj pli profunden en la arbaron inter humidaj-

malvarmaj arbustoj kaj branĉoj, dum la pluvo ekfortigis. "Kie en la infero estas tiu bierejo" – li pensis kun ĉagreno, pli kaj pli dezirante la varmajn kolbasetojn kun mustardo.

Post horoj li alvenis hejmen, malsata kaj malseka, tamen kun la agrabla sento, ke la sinjorino komprenis, ke ili ne plu rendezvos. Kaj al la vera amiko li diros, ke... do, tion li ankoraŭ priprenos.

La sekvan tagon vespere, iomete antaŭ la komenco de la telejurnalo, aperis telefono la sinjorino. Li do mallaŭtigis la televidilon kaj aŭskultis, kia simpatia junulo li – Roberto – estas, kiu kapablas kompreni la problemojn de virinoj kaj konsenti kun ili. Roberto rigardis la reklaman kaj poste la bildojn pri surstrata demonstracio, akceptadon de iu eksterlanda delegacio, spurojn de eksplodo de iu palaco ie, la rezultojn de la dimanĉaj futbalmatĉoj. Dume li respondis plejparte jese, foje redemandis iun nomon, lokon, jaron.

Post du tagoj, dum la vespera filmo reaparis ŝia voĉo. Nun ŝi rakontis pri la lastfoje prezentita kavaliro, pri lia malfideco, pri sia sorto, dum Roberto kaŝe reatigis iomete la televidilon kaj klopodis kompreni, kiel la detektivo suspektas ĝuste iun dikulon, kiu eĉ ne havis rolon ĝis nun. La telefonvokoj fariĝis regulaj inter la oka kaj la deka vespere, la temo plejparte restis la sama, kaj la virino pli kaj pli intima. Li jam koniŝ la amikinojn, la gepatrojn, la iamajn lernejarajn rezultojn, la malsanojn, la problemojn de la onklino, sed ĉefe la eksan amanton. Ŝi plendis pli kaj pli, eĉ ekploris foje, kaj Roberto eksciis, ke la vivo por ŝi valoras jam neniam, kaj estus pli bone, se ŝi mortus. Roberto pensis, ke tio ne estas malbona ideo, sed respondis, ke post ĉio malhelo venos la lumo, kaj la vivo estas la plej valora afero (ĝuste tiun frazoon diris la edzino de la viktimo tra la televidilo), kaj finfine ĉio solvigos. La sinjorino estis dankema, ŝi ĉesis plori kaj diris, ke li – Roberto – estas eĉ pli saĝa ol ŝi komence opiniis, kaj krome li – Roberto – ne volas tuj havi seksan rilaton kun la virinoj kaj pli multe gravas por li – por Roberto – la komuna anima interprofundiĝo.

Tio ĉi plaĉis al Roberto kaj agrable tiklis lian fieron. Ankaŭ la nuna filmo estis daŭrigota, kaj la lasta parto estis programita por la sekva vespero. Same la telefonvoko de la sinjorino. Ŝi volis denove sin mortigi kaj demandis Robertson, ĉu li konas iun efikan, akireblan medikamenton por sendolora, eterna endormiĝo. Sur la ekranon la fimiena viro (certe evidentiĝis, ke estis li la murdisto) malfermis la fenestron kaj volis elpuŝi tra ĝi la simpatian blondulinon, kiu helpis al la juna detektivo. La belulino kriegis altvoĉe, hororplene, premis la kurtenon kaj terurite gapis malsupren en la profundon, kie videblis la lumoj de la stratoj kaj de la aŭtoj. "En kioma etaĝo vi loĝas?" – demandis Roberto. "En la naŭa..." – respondis surprizite la sinjorino. "La plej certa kaj malmultekosta procedo estas ĵeti sin tra la fenestro. Se vi jam tiel decidis, kial serĉadi malbonefikajn dormigilojn, malpurigiĝi per tranĉilo, penadi per trovi taŭgan alkröĉon por ŝnurego: kie ĝin alligi? Alvenis ĝusta momento, iru al la fenestro,

malfermu kaj ĵetu vin suben... Tutcerta solvo. La telefonon vi povas lasi, ne re- kroĉu, mi restos kun vi..." Kiam Roberto aŭdis la paŝojn forirantajn, singarde remetis la aŭskultilon kaj plilaŭtigis la teledildon por vidi almenaŭ la finon de la filmo.



Ekde tiam la telefonvokoj de la sinjorino ĉesis. Roberto senĝene povis sekvi la vesperajn programojn, kaj atendi junan, belan virinon, kiu malpli parolos kaj ne bezonas oftajn akompanojn al la operejo kaj invitojn lukse vespermanĝi.

Roberto tamen ofte pensis, ke fakte li estis la lasta, kun kiu la sinjorino parolis, de kiu ŝi petis konsilon, helpon... por sinmortigo... terure... Sed finfine, ŝi mem elektis la morton, ĉu ne... se ŝi ne volas, al tiu oni vane dirus ĵeti sin de la natia etaĝo. Li prezentis nur tion, kio estas la plej efika (kaj malmultekosta) sinmortig-metodo... Se tiam ne Roberto dirintus tion, eble ŝi mortus ne en tiu tago, sed ĉiel du, tri tagojn poste. Kaj eble alimaniere, pli dolore... Ŝi mem elektis la morton, damne.

Kaj tiun certan veran amikon li konse- vence evitis: kion diri al li? Ke la sinjorino estis ne tiel bela, ne tiel juna, ŝi verŝajne havis eĉ ioman problemon en sia kapo... Stulte, ĉar tiu kapono direktis sin al alia ĵupo, ŝi ne plu kapablis trovi al si ŝivan amikon. Ŝi povis daŭre paroli-pensi nur pri tiu violonkapulo, kiu – laŭ Roberto – ne meritas tian amon. Roberto sufiĉe belaspektas, sed pro li ankoraŭ neniu virino volis forĵeti la vivon... Jes, – li meditis, – tia estas la vera amo... Ĝis la tombo.

Cetere, li ankoraŭ ne malkovris en la ĵurnaloj la komunikon pri tiu... akcidento. Oni ĝenerale mencias tiaspacajn nova- aĵojn... Ŝi estis tamen vere inteligenta virino... la povrulino. Ŝi meritis alian sorton... bonan edzon, aŭ amanton, veran amikon, kiel mi... tiu kreteno verŝajne ne volis ŝin edzinigi. Kaj jen, tiajn la virinoj amas, pro tiaj ili faras sinmortigon. Ŝi devintus forlasi tiun porkon, mi dirus al ŝi, ke ekzemple...

Roberto surprizite rimarkis, ke li laŭte parolas, paralele kun la junulo en la teledildo kiu anoncis la rezultojn de la futbalmatĉoj. Dum kelke da semajnoj li daŭre pensis pri ŝi, kaj kulpigis sin pro la morto de tiu valora virino. Li jam centoble pentis siajn lastajn frazojn al ŝi, kaj imagis kion li devintus konsili.



Feminisma Esperanta Movado deziras serene egalrajtan novan jaron kun la tria kolekto de Femina la revuo ne nur por virinoj reaboninda por vi mem aboninda por via amikino

Bondezirojn!

numero 9 – printempo 2007

Pasis jam preskaŭ duonjaro, kiam en iu vespero, precize je la oka kaj duono (ĵus komenĝis nova filmoserio) sonoris la telefono.

– Saluton, bonan vesperon, kara Roberto! Kiel vi fartas? Ĉu vi divenas, kiu mi estas? Jes ja, estas mi! Vi rememoras, ĉu ne? Pardonu, kara Roberto, ke mi silentis tiel longe, ne koleru pri mi... sciu, ke mi tute ne forgesis vin! Vi estis al mi ĉiam tiel bonkora, tiel ĝentila, vera ĝentlemano. Kaj vi estas vere tre saĝa kaj inteligenta! Do, imagu, kio okazis! Mi edzinigita! Vi povas gratuli. Ne imagu, ke al tiu... hoo!... eĉ lian nomon mi ne plu eligus tra mia buŝo! Ne, tute ne, sed, okazis ke...

Kaj ŝi rakontis. Sen inter- rompo. Sen enspiro. Precize dum unu horo kaj dek kvin minutoj.

Krom tio, ke Roberto ne sukcesis sekvi la unuan parton de la teledida serio, li plej multe bedaŭris pro la konscio, ke ne ekzistas vera amo.

- 2 redakcie
Ne estingota meĉo en nia kandelo por Anna
- 3 Perla Martinelli
Pac-Nobelaj: ofte la plej noblaj
- 4 Nobel-haureato Aung San Suu Kyi
Devigata al silento sed ne senvoĉa
- 6 Jean-Jacques Lavanchy
Kion signifas "spirite maskla"
- 7 Marie-France Conde Rey
La nigra realo de la virinoj
- 8 Leendert C. Deij
Nur la virino povas findecidi
- 10 Marie-France Conde Rey
Familia epopeo
- 13 Kitaro Ibilisi
Modo kaj etiko: por evoluo daŭrebla
- 14 rolfo
Zeno: plenigante la nenion
- 18 Elena Grisafi
Ankaŭ bestoj konas inferon
- 21 Marie-France Conde Rey
Subita frosto
- 22 Klara
La verda partio pri prostitucio
- 23 Leendert C. Deij
Nomu ĝin kiel vi volas - ĝi restas abomenaĵo
- 25 Berta Lenard
Roberto la eksperto

